

Germana Esperantisto

Der Deutsche Esperantist

Oficiala Organo de
Germana Esperanto-Asocio (G. E. A.)
kaj de aliaj esperantistaj unuiĝoj

Aperas duonmonate en du alternantaj eldonoj:
Eldono A (Propagando) — Eldono B (Literaturo)



Offizielles Organ des
Deutschen Esperanto-Bundes E. V.
und anderer Esperantisten-Vereinigungen

Erscheint halbmonatlich in zwei abwechselnden Ausgaben:
Ausgabe A (Propaganda) — Ausgabe B (Literatur)

Abonprezo: por jaro 2.400 Sm. (Provabono por duonjaro, komen-
ciĝanta en Januaro kaj Julio, 1.200 Sm.). Ĉiu eldono aparte:
1.200 Sm. (0.600 Sm.). Anoncoj: Vidu tarifon sur la kovrilo

Bezugspreis: für ein Jahr 4.80 M (Probeabonnement für ein Halb-
jahr, beginnend im Januar und Juli, 2.40 M). Jede Ausgabe ein-
zeln: 2.40 M (1.20 M). Anzeigen: Siehe Tarif auf dem Umschlag

Redaktoro: Friedrich Ellersiek, Berlin S 59, Wissmannstr. 46

Alsenditajn artikolojn la redakcio laŭ bezono korektas. Nepresitajn manuskriptojn ni redonas nur, se oni aldonis poŝtmarkon por la resendo

11^a Jaro No. 3 B

Eldonejo kaj Redakcio: Dresden-A. 1, Struvestr. 40

Marto 1914

Grava avizo!

Germana Esperanto-Asocio kaj Germana
Esperantisto aranĝos kun helpo de U. E. A.

karavanon al la Deko en speciala
vagonaro Berlin—Paris kaj reen

(versajne tra Frankfurt a. M.—Metz)

por entuta prezo de proksimume

140 M (69 Sm)

Ĝi forveturos el Berlin la 1an de Aŭg. matene
kaj estos en Paris la 2an de Aŭg. mat. La re-
veturo komenciĝos la 9an de Aŭg. vespere kaj
finiĝos la 10an vesp.

La vagonaro jam estas certigita!

Enkalkulitaj en la prezo estas ankaŭ:

Loĝado kaj po 3 manĝoj ĉiutage (inkluzive
trinkaĵojn) en bonaj hoteloj en la proksimeco de
la kongresejo, trinkmonoj, gvidadoj tra la urbo
en veturiloj, ktp. ktp., entute ĉio, kion oni
ĝenerale bezonos krom la pure kongresaj aferoj.

Detaloj pri tiu ĉi vojaĝo sekvas en la venonta
numero A. Informojn donas la oficejo de Ger-
mana Esperanto-Asocio, Pirnaische Str. 50, II,
Dresden-A., aŭ la redaktoro de G. E., Friedrich
Ellersiek, Wißmannstr. 46, Berlin S 59.

La artefarita „Altmontarsun-Bano“

De Dro Breiger, san. kons., Berlin

Estas mondkonate, ke preskaŭ neniu besto
nek planto povas prosperi sen lumo, kaj ankaŭ
homoj sen ĝi malsanetiĝas, malfortiĝas, plej frue
maljuniĝas kaj mortas. Tio estas certa fakto.
Sed ne tute certa estas la kialo de tiu ĉi efiko
de lumradioj. Jen la varmo! oni diris. Sufiĉas.

De 15 jaroj mi okupis min preskaŭ nur pri
lumkuracado (lumterapijo). Jam de komenco mi
dubis pri tio, ke la ŝvito, kiu abunde aperas en
lumbanoj, estas la ĉefefiko de tiu ĉi terapijo, ĉar
miaj spertoj kaj sukcesoj devigis min supozi, ke
lumradioj, ĉu ili devenas el la suno mem, ĉu el
iu alia, artefarita lumfonto, krom la energio
radianta de varmo havas iun specialan forton,
per kiu ili diferenciĝas de ĉiuj aliaj varmigiloj
kaj ŝvitigiloj, kaj ke tiu forto estas la ĉefa kaŭzo
de ilia mirinde saniga eco. Bedaŭrinde mi tute
ne povis trovi sciencan kaj nekontraŭdireblan
pruvon por tiu ĉi teorio. Do, tiu ĉi nova kurac-
metodo, tiel grava por la homaro, nur malmulte
disvastiĝis. Antaŭ 7 jaroj mi hazarde trovis tion,
pri kio mi tiom longe vane meditis. Por klarigi
ĝin al la legantoj, mi devas iom detale raporti
pri tio. Jam de 10 jaroj oni uzis por lumkuracado
krom elektra karbarklumo, kiu aperas inter karbaj
elektrodoj, ankaŭ feran lumon, kiu produktiĝas
inter feraj elektrodoj. Tiu ĉi lumo enhavas multe
da bluaj, violkoloraj kaj ultraviolkoloraj radioj
kaj malmulte da ruĝaj kaj flavaj. Ĝi grave incitas
surradiitan haŭton. Do oni uzis ĝis sukcesplene
por kuracado de diversaj kronikaj malsanoj de
la haŭto (ekzemo, psoriano k. t. p.). Poste oni
anstataŭigis la feran lumon per lumo el hidrarga
vaporo (kvarca lampo). Sed ankaŭ tiuj ĉi lampoj,
kvankam la efiko estas la sama, estas tro mal-

grandaj por tiu ĉi celo kaj ne bone taŭgas, ĉar oni per unu fojo povas surradii nur malgrandan parton de la korpa haŭto. Tio ofte treege malfaciligas la aplikadon kaj faras ĝin longedaŭra. Por forigi tiujn ĉi malfacilaĵojn ĉe la kuracado per ultraviolkoloraj radioj, mi muntigis pli grandan kvarcan lampon tiamaniere, ke oni povas surradii samtempe tutan flankon de homa korpo. Kiam mi nun surradiis per tiu ĉi nova lampo iom grasan psoriazulonon, mi observis strangajn procedojn: antaŭ ĉio la graso malpliĝis, samtempe la haŭto bruniĝis, eĉ la vizaĝo, kvankam ĝi estis kovrita per tuko dum la radiado, kaj la aspekto de la malsanulino tute similis al tiu de homo, kiu ĵus revenis el altmontara restado. Tiu ĉi observo igis min provi la novan metodon ankaŭ ĉe aliaj malsanuloj, kaj ĉiam mi rimarkis la samajn mirindajn efikojn. Ĉar la malsanuloj nenion alian uzis, nek ricevis specialajn ordonojn pri dieto k. t. p., la malpliĝo de la graso nur povis esti kaŭzita per la ultraviolkoloraj radioj. Tiamaniere mi hazarde trovis la pruvon por mia teorio kaj samtempe la kaŭzon de la samvalora efiko de l' „altmontara suno“ kaj de la ultraviolkoloraj radioj. Do fariĝis por mi klare, kial la kuracado per la altmontara suno, t. e. suno, kiu radias sur altaj montoj de pli ol 1500 metroj super la maro, kiun de 9 jaroj aplikadis Droj Bernhard en Samaden kaj Rollier en Leysin ĉe vundoj kaj precipe ĉe tuberkulozaj malsanoj de ostoj kaj de artikoj, havis la saman efikon, kiel la kuracado per elektra karbarklumo, kiun mi faris de 15 jaroj ĉe la samaj malsanoj kaj kiujn ankaŭ aliaj kolegoj povis konstati. Jen la ultraviolkoloraj radioj, ĉar ankaŭ la karbarklumo enhavas abunde ultraviolkolorajn radiojn, certe multe pli, ol la suno de l' ebenaĵo, kvankam ne tiom, kiom la altmontara suno kaj la kvarca lumo, kiu estas la plej riĉa je ultraviola koloro.

Tiuj ĉi observoj incitis min, konstruigi la artefaritan „Altmontarsun-Bano“, kies konstruo ebligas tute precizan dozadon de lumo, ĉar 1) oni povas variigi la daŭron de la radiado kaj 2) oni povas alproksimigi la lumigilojn sur linio gradiita laŭcentimetre.

La artefarita „Altmontarsun-Bano“ tute ne estas ŝvitbano; simile al la natura altmontarsuno ĝi ne sekvigas rapide ŝvitadon. Unue ĝi kaŭzas fortan haŭtincitigon, kiu sekvigas fortan sangalfluron al la haŭto. Tiu ĉi arteria hiperemio de la haŭto ne okazas tuj post la surradiado, sed ĝi nur iom post iom pli fortiĝas, ĝis kiam ĝi post 6—8 horoj estas plej forta. Tiam ĝi restas samforta kelkajn horojn, eĉ 1—2 tagojn, kaj fine ĝi malrapide



malaperas. Laŭ la pli-malpli longa radiado kaj laŭ la pli-malpli granda distanco inter la lampoj kaj la homa korpo, la efiko estas pli aŭ malpli forta; oni do povas bone dozi la surlumadon laŭ bezono.

Samtempe kun mi, S-ro kolego Bach el Bad Elster, provante la sangpremon en vazoj post ultraviolkolora surradiado, faris la samajn strangajn spertojn. Gravege estas, ke ni ambaŭ preskaŭ samtempe publikigis la sukcesojn de ni faritajn, ne sciante unu pri la alia.

Certe, tiuj ĉi publikigaĵoj signifas gravan progreson sur la kampo de lumterapio; unue, ili pruvas la hipotezon, kiun mi jam de komenco faris pri speciala lumefiko, kaj due — ili montras al la lumterapio novan vastan agadkampon.

Plifortiĝo de sangalfluo al la haŭto, daŭranta multajn horojn, kompreneble kaŭzas ankaŭ alfluron en la vojojn, kiuj kondukas la sangon ĝis la haŭto. Do sekvos pliboniĝo de la nutrado kaj plifortiĝo de la asimila procedo en tiuj ĉi organaj partoj kaj samtempe plimalgrandiĝas la laboro de la kormuskolo kaj la sangopremo plimalfortiĝas. Jam nur la lasta afero, daŭranta kelkajn horojn sen iu kroma efiko de medikamento, multe helpas la kuracadon al kormalsanuloj.

Noto de la redakcio — Al tiuj legantoj, kiuj volas sin detale informi pri la „Altmontarsun-Bano“, ni rekomendas la esperantlingvan broŝuron de la sama aŭtoro: „La artefarita Altmontarsun-Bano.“ Ĝi estas havebla por 0.200 Sm. ĉe Ader kaj Borel.

Mallonga rondiro tra Leipzig, la urbo de la 9a Germana Esperanto- Kongreso je Pentekosto (30a de Majo ĝis 3a de Junio) 1914.

La maja suno brilas. Antaŭ ni kuŝas la urbo, pura kaj ĉarma kiel ĉambro de junulino. Nun venu, por ke mi gvidu vin tra nia *Klein-Paris* (malgranda Parizo). Nur preterpasante ni vidos tion kaj tion; ĉar malvasta estas la spaco, kiun permesis la severa sinjoro redaktoro. Pri kio vi precipe interesigas, tion studu mem detale, kiam vi venos al ni kiel karaj gastoj. Kaj nun — antaŭen!

Ni eliru de la *ĉefstacidomo*, kiu kvazaŭ estas la koro de la urbo. Senĉese alvenas aroj da personoj, montoj da pakajoj kaj leteroj, kaj ankoraŭ pli granda nombro eliras de tie en la tutan mondon. Nun la konstruaĵo ja ne jam estas tute finkonstruita; grandegaj kranjoj etendas siajn ferajn brakojn ĉielen, turniĝas kaj levas multajn centfuntojn kiel ludilon. Sed jam nun la bela domo estas grandioza kaj impresa.

Ni laŭiras rekte antaŭen la *Goethe-straton*. Maldekstre en valetto kuŝas la *Schwanenteich* (lago de l' cignoj), restaĵo de la iama ĉirkaŭurba

foso; ĉarme limigas ĝin la teraso de l' *nova teatro*. — Jen la rigardo jam vagas trans la grandan, belan *Augustus-placon*, kiu estas vera juvelo de Leipzig. Kiu ne ĝojos pri la artaj frontoj de la universitato, operejo, ĉefpoŝtejo, muzeo por la pentrarto kaj de multaj privataj domoj? Se ni havus tempon, ni rigardus en la festĉambrego de la universitato la grandegan pentraĵon de Max Klinger: *Homer deklamas siajn rakontojn*. Aŭ ni irus en la muzeon, por ĝoji pri la verkoj *Beethoven*, *la Banantino* kaj *la Blua Horo* de la sama artisto, kaj ne flankelasus multajn aliajn pentraĵojn, grafikajojn kaj skulptaĵojn. Sed — antaŭen!

Se ni irus laŭlonge de la meza strato trans la placon orienten, ni venus tuj al la *kongresa oficejo* kaj baldaŭ al la libroindustria domo, kie troviĝas la *Saksa Esperanto-Instituto*. Sed verŝajne la legemuloj el miaj legantoj ne plu forirus, antaŭ ol esti legintaj la multajn Esperantajn gazetojn kaj librojn, kiujn konservas la komforta legoĉambro. Tial mi preferas konduki vin okcidenten tra la *Grimmaische StraÙe*. Inter altaj domoj, kiuj plejmulte servas kiel specimenejoj dum la du grandaj ĉiujaraj *Messen* (foiregoj), ni iras ĝis *Naschmarkt*. Tie staras la majstre modelita monumento de *Goethe*. La laŭmode vestita junulo malsupreniras la universitatan ŝtuparon. Li tenas libreton en la mano. Ĉu estas scienca verketo? Mi ne kredas; ĉar la junulo tiam inklinis al tute alia studo, kion atestas ĉe la subaĵo de l' monumento la portretoj de du ĉarmulinoj, kun kiuj li kredeble ne parolis pri la legoscienco. Eble li intencas ĝuste, malsupreniri en *Auerbachs Keller*, kiu logas el trans la strato. Kara samideano, aminda samideanino: ĉu vi jam konas tiun ĉi lokon? Ĉu vi jam vidis ĝiajn belegajn pentraĵojn kaj historiajn memoraĵojn? Ĉu vi jam sidis tie en amika rondo noktmeze, ĉirkaŭflugata de la fantomoj de l' vino, de gajemo kaj de l' memoro je la malnova *Faust-fabelo*? Se ne, mi vane klopodus priskribi tiun impreson; venu kaj provu mem!

Jen estas jam la foirejo. Malnovaj domoj, konstruitaj laŭ baroka aŭ renesanca stilo, ĉirkaŭas ĝin. Ho, se ili povus rakonti, kion ili vidis dum tri — kvar jarcentoj en pacaj kaj militaj tempoj! Ĉu vi interesiĝas pri tio detale? Se jes, eniru la renovigitan urbodomon, kiu enhavas riĉegan ekspozicion pri la historio de Leipzig. Kaj se vi estas artamanto, ne forgesu atente rigardi la belan *Siegesdenkmal* (monumento de l' venko).

Nun ni iru suden tra la malnova, malvasta, hejmeca *PetersstraÙe*. Sed, kara kunulino, mi petas serioze, ne haltu tiom ofte! Kio estas? *La dernier cri de la saison*? Jes, tiun vi vidis verŝajne ankoraŭ dekfoje tie ĉi en la elmontraj fenestroj de la tajloroj, ŝumagazenoj, frizistoj, ĉapelistinoj, silkkomercejoj ktp. ktp. Sed kiam

ni finus nian promenadon? — Kaj vi, kara samideano, ne turnu vin tiom ofte, por postrigardi unu el la belaj Leipziganinoj. Eble iu kaptos vin! Mi avertas! Ho, vi jam estas edziĝinta? Des pli danĝere!

Dank' al Dio! Jen ni alvenis al la *nova urbodomo*. Demetu la ĉapelon, sinjoro! Tiu estas la domo, kie oni fabrikas la imposttabelojn! Verŝajne pro tio la konstruaĵo havas tiom seriozan karakteron — aŭ eble pro tio, ke sur ĝia loko staris antaŭe la kastelo *Pleißenburg*? Nu, timu nenion; kontraŭ siaj gastoj la urbo estas tute ne prenema; kaj se vi trairus la koridorojn aŭ suprenveturus la 112 metrojn altan turon, vi eble aŭdus oficistojn parolantajn nian Esperanton, kiun la ĉefurbestra moŝto tre favoras. — La serioza konstruaĵo tamen havas ankaŭ serenajn angulojn: jen, vidu, estas la eniro de l' *Ratskeller*, kaj la gaje ridanta leono kun vinpokalo ne logu nin vane!

Trans la *Pleißer-rivero* ni ekvidas nun la *Reichsgericht*; kaj se estus vintro kaj vendredo, ni irus al la koncertodomo malantaŭ ĝi, por aŭdi simfonion direktatan de majstro *Nickisch*; sed nun bedaŭrinde la pordego estas fermitaj.

Kvaronhoron ni laŭiru ankoraŭ nian belan promenejon, kiu anstataŭ la iama remparo nun ĉirkaŭas la urbocentron. Tra ĝardenaĵoj plej belaj ni promenas, sub tilioj kaj platanoj; post ĉiu kelkdeko da paŝoj aperas aliaj belaĵoj. Jen dekstre la *Thomaskirche*, en kiu la mondfama ĥoro kantas ĉiusabate je la 1^{1/2} tagmeze. Ne forgesu aŭskulti tion! Apude staras la belega monumento de *Bach*, kiu estis (1723—1750) tie ĉi kantoro kaj orgenisto. Jen belega puto, reprezentanta scenon el la fabelo *Hänsel und Gretel*. Jen la *Matthäikirche*, antaŭ kiu baldaŭ staros la monumento de *Richard Wagner*, skulptita de Max Klinger. Jen la *malnova teatro*, kiun jam vizitis Goethe kiel studento kaj kie oni ovaciis al *Schiller*, kiam li forlasis la domon post la unua reprezentado de sia *Jungfrau von Orléans* (1801). Jen longa vico da aliaj publikaj kaj privataj domoj — kiel fari, nur por nomi ilin?

Volonte mi ankoraŭ dirus kelkan vorton pri la ĉirkaŭaĵo de mia kara Leipzig, kiun oni malprave konsideras senĉarma kaj kiu ĝuste dum la pentekosta tempo prezentigas plej belan. Sed la permesita papero finiĝas. Tial mi nur aldonas ankoraŭ la deziron, ke multaj gesamideanoj venu, por vidi ĉion, kion mi priskribis, kaj multon pli.

Se vi deziras vidi belajn artaĵojn, studi historiajn rimarkindaĵojn, aŭdi bonan muzikon, aŭ nur simple esti gajaj en rondo de bonhumoraj gesamideanoj:

Venu al Leipzig!

kaj vi trovos, kiun vi serĉis.

Paul Bennemann, instruisto

Memoroj de infano

Kultura dokumento por la eduka problemo de

Kurt Sommer

Ĉi tiu verko ricevis la duan premion en la literatura konkurso pri prozaĵoj beletristikaj de la Oka Kongreso en Kraków. [1906]

(Ĉiuj rajtoj estas rezervitaj de la aŭtoro.)

(Daŭrigo)

Mi havis aĝon de dek unu jaroj, kiam mia fratino iun tagon klarigis al mia patro, ke ŝi en estonteco ne plu prizorgos la mastrumadon, sed deziras labori en fabrikejo, por perlabori monon, por kiu ŝi aĉetos la necesajn aĵojn por eventuala edziniĝo. La patro konsentis, kaj li decidis, ke li serĉos virinon, kiu povos prizorgi la mastrumadon, intertempe, li aldonis, ni faros la aferon tiamaniere: ci preparos la manĝaĵojn vespere, kaj Kacjo, reveninte el la lernejo, nur bezonas varmigi ilin. —

Dum la daŭro de tuta jaro mi tiel estis farinta kaj mi ĝojis, ĉar mi ne plu staris sub la estreco de mia fratino. Mi laboris diligente, kaj kiam ambaŭ estis foririntaj en la fabrikejon (mia frato jam de longe estis forlasinta nin), mi ludis kun aliaj infanoj sur la strato, aŭ en la korto, denove mi ekvivis, ĉar tio estis por mi io tute nova. Certe, poste kiel antaŭe mi lavis la manĝilaron, purigis la loĝejon, balais la ŝtuparon ktp., sed ĉion mi faradis volonte, ĉar poste mi ja povis ludadi kun aliaj geinfanoj. Sed en tiu tempo mia patro oftege batis min, ĉar okazis, ke la manĝaĵoj estis aŭ tro varmegaj, aŭ tro malvarmaj, kaj iun tagon li preskaŭ mortige batis min. Kial? Mi rakontu.

Antaŭ ĉio mi devas sciigi, ke mia patro aĉetis por mi nur la plej necesajn lernolibrojn, kaj eĉ tiujn mi nur ricevis post multe da plendado, — do, iun tagon mi tute ne sciis respondi je demando de la instruisto, kaj sekve de tio mi devis postresti en la lernejo plian horon; laŭ la ordono de la lernejestro ne estis permesite al la instruisto, batpuni min, pro mia troa nerveco. Ĝuste en ĉi tiu tago mi havis ordonon, kuiru terpomojn, ĉar ni volis manĝi marinitan haringon kaj terpomojn. Fine la horo estis pasinta, mi kuregis hejmen, jam estis kvarono post la dek-unua, kaj kelke da minutoj post la dek-dua la patro kaj la fratino estis venontaj hejmen. Rapi-dege mi ekbruligis la fajron en la forno, purigis la terpomojn, metis ilin en poton, aldonis iomete da salo kaj ŝovis la poton en la fornon. Poste mi pretigis la manĝotablon, faris ĉiujn preparajn laborojn, kaj la horloĝa montrilo dume jam forte rapidis al la dek-dua, kion mi de tempo al tempo, ŝvitante preskaŭ sangon, konstatis. Sed kvazaŭ

Dio estus forlasinta min, la fajro nur malbone brulis, kaj nur post multe da penado mi sukcesis havi bonan fajron.

Nur kelke da minutoj ankoraŭ, kaj la patro venos; li tiuj ekscios, ke mi devis postresti en la lernejo kaj tiam — — ho ve!

Tremante je la tuta korpo mi staris ĉe la forno, en unu mano manĝoforkon por ekpiki la terpomojn, en la alia la pototukon, kaj atendis la kuiron de la terpomoj. Mi ne kuraĝis forpreni la potkovrilon, ĉar tio eĉ por unu sekundo certe estus prokrastinta la kuiron. — La murhorloĝo sonoris la dek-duan. Nun mi ne plu povis konservi la trankvilon, mi eltiris la poton kaj volis ekpiki la terpomojn, ĉu ili jam estas molaj. Sed, terure — levante la potkovrilon mi rimarkis, ke mi estis forgesinta aldoni akvon! Tute konsternite mi nun aldonis anstataŭ varma, malvarman akvon kaj reŝovis la poton en la fornon. Mi aŭdis la bone konatajn paŝojn de mia patro ekstere sur la ŝtuparo — li eniris.

Nu, kio estas?

Patro, la fajro hodiaŭ tute ne brulis.

Kiam ci revenis el la lernejo?

Tuj post la deka, mensogante mi respondis, sed per plorema voĉo.

Diru la veron, ci devis postresti en la lernejo!

— Lia voĉo sonis akre, kaj liaj okuloj kvazaŭ trapikis min.

Ne, patro.

En tiu momento mia fratino eniris, kaj la sama ripetigis; ŝi forprenis de mi la pototukon kaj eltiris la poton el la forno. Farante tion ŝi rimarkis, ke la akvo en la potu nur estas varmeta, kaj tuj ŝi ekkriis tion.

Nun restis al mi nenio alia: mi konfesis, ke mi forgesis aldoni akvon. Apenaŭ mi estis dirinta tion, kiam mia patro kun la vortoj „sentaŭgulo, mensogulo, kiajn pensojn ci havas en cia kapaĉo“ vangofrapis min, ke mi por kelke da minutoj nur vidis la amerikan flagon, nome steletojn kaj kolorajn striojn. Ĉio en la mondo ja havas finon, sed preskaŭ ne tiu meztaga horo, kaj la plej terura tuj ankoraŭ efektiviĝis.

— Eniru! vokis mia patro, ĉar iu estis frapinta la pordon, kaj eniris — ho terurege — mia instruisto.

Post la salutaj paroloj mia instruisto klarigis malkaŝe al mia patro, ke estas urĝe necese, ke li por mi aĉetu la necesajn lernolibrojn, kaj — li daŭrigis, sole pro tio mi hodiaŭ ree estis devigata, restigi vian filon je unu horo. — Ne atendante respondon la instruisto foriris. —

Palega pro kolero mia patro eksaltis kaj ekkaptis min, prenis bastonon sufiĉe dikan kaj batis min, batis senhalte. — — Senmove mi kuŝis en la ĉambro, kaj ruĝa sango fluis el mia ĉemiza maniko. —

Kiam mi post longe leviĝis, ambaŭ, la patro kaj la fratino, forestis. Malamego plenigis min, kaj mi decidis foriri kaj salti en la riveron. Mi foriris kaj vagadis en la arbaro, sed ne havis kuraĝon, min dronigi. Ofte mi staris ĉe la rivera bordo, kaj ĉiam mi returnis min senkuraĝe kaj daŭrigis mian vagadon tra la arbaro. La tago pasis, kaj la luno aperis sur la ĉielo, mi kuŝiĝis sub arbo kaj, malforta pro malsato, mi ekdormis.

Kiam mi la alian tagon vekigis, la suno staris alte sur la ĉielo. Kion fari? Mi decidis iri hejmen; okazu, kio volas okazi, mi pensis, kaj iris. Kiam mi estis proksime al nia domo, iu najbarino vidis min kaj rakontis al mi, ke mia patro, mia fratino kaj kelke da najbaroj estis serĉintaj min la tutan nokton. Mi restis ĉe la najbarino ĝis tagmezo. Tiam ŝi kondukis min al mia patro. Ĉi tiu rigardis min tre serioze kelke da sekundoj, sed diris tute nenion, kvazaŭ tute nenio estus okazinta. Kiom feliĉa mi estis, ke la tuta afero tiel bone preterpasis! Sed, ho ve, mi estis kalkulinta tute malĝuste.

Kelke da tagoj post la terura okazintaĵo mia patro iam demandis min, kiaj libroj al mi mankas. Mi nomis ilin unu post la alia, kaj kiam mi estis fininta, ni iris kune al la libristo, kaj mia patro senparole aĉetis ĉiujn. Mi devas konfesi, ke mi estis postulinta kelkajn librojn tro multe, ĉar mi volis pruvi al mia patro, ke sole li, kaj nur li, estis la kulpa parto; sed mi tuj montros, ke ankaŭ en tiu manovro mi estis la trompita, do trompita trompanto.

Reveninte hejmen mi trarigardis kaj foliumis la belegajn librojn, kaj mi nun kredas, ke mi tiam, almenaŭ en tiu momento, estis forgesinta ĉion malbonan kaj ree amis mian patron. Sed ĉi tiu, vidante min foliumi, vokis min kaj diris: Mi nun aĉetis ĉiujn librojn, kiujn ci postulis, kaj mi esperas, ke de nun mi neniam plu aŭdos ian plendon pri ci. Mi ja tre bone scias, ke por ĉia maldiligento nenio, eĉ ne la plej bona libro helpas, krom la bastono; tamen mi ne plu ĉagreniĝos pri ci, sed mi havas rimedon bonegan, por eduki cin, do atentu: Mi donos al ci ĉiutage lecionon, kiun ci dumtage sufiĉe ofte tralegos, kaj vespere mi ekzamenos cin pri ĝi. —

Kun teruro mi estis aŭskultinta, kaj malkuraĝo ekkaptis min, ĉar mi bone sciis, ke mi neniam sufiĉe bone ripetados miajn taskojn, ĉar tro bone mi konis mian patron tiurilate. Tremante je la tuta korpo mi tiun vesperon kuŝiĝis kaj kuŝis certe kelkajn horojn sendorme en mia lito.

La sekvantan tagon la afero komenciĝis. Matene mi estis en la lernejo, kaj posttagmeze mi sidis sola en nia loĝejo kaj legis kaj relegadis legajon, kiun mi tute ne komprenis, ĉar pri tio ni ankoraŭ ne estis instruitaj en la lernejo. Mi legis, kaj dume mi aŭdis de malsupre la laŭtajn parolojn de la veturigistoj, kiuj, preterveturante,

regule haltis antaŭ la trinkejo; mi vidis la belajn sunradiojn ludantajn en la ĉambro kaj aŭdis la kriadon kaj la bruon de miaj kunuloj, kiuj ludis en la korto, kaj mi — legis, legadis. Kvazaŭ flugante la tempo pasis, proksimiĝis la vespero, kaj mi ĉesigis mian legadon, mi ekbrulis la fajron kaj pretigis la vespermanĝon.

Post la vespermanĝo la patro kutime sidiĝis sur la sofo kaj legis la gazeton, sed ne tiun vesperon. Apenaŭ manĝinte la patro ordonis al mi, doni al li la libron, li tralegis la legajon, kaj dume mi purigis la manĝilaron, kaj mia fratino sidis ĉe la tablo kaj legis romanon. Sed mi bone vidis, ke ŝi nur ŝajne legis kaj senpacience atendis, kio okazos. —

Karlo! vokis mia patro, sidiĝu tien kaj ripetu. Mi devas aldoni, ke mia patro jam de longe min ne plu nomis Kaĉjo, kiel antaŭ jaroj. Tremante mi komencis ripeti, sed tute konfuze. Fine, post longe, mi ĉesis, kaj kiam mi vidis la vizaĝon de mia patro kaj vidis liajn okulojn, mi esploris kaj diris al mia patro, ke ni en la lernejo ankoraŭ ne estis priparolintaj tiajn legajojn.

Ha, kiom ci estas saĝa, mia bubeto, li respondis, ĉu ci eble kredas, ke mi postulos de ci la alfabeton? Ne, fileto mia, mi ja bone scias, ke al ci ne mankis la libroj, ci nur ne scias serioze studadi, sed mi volonte helpos al ci, atentu, ci deskribos morgaŭ la legajon trifoje, tiam ci bone scios ĝin parkere ripeti, nun iru dormi!

Naŭzo kaj malamo plenigis mian koron, kiam mi la sekvantan tagon estis devigita atentigi mian patron pri tio, ke mi havas por la tago tre grandan kvanton da lernejoj taskoj plenumotaj, kaj li respondis: Bone, mi estos kontenta, se ci deskribos la legajon nur dufoje.

Tuj kiam la patro kaj la fratino estis foririntaj, mi ekskribis. Mi estis decidinta, unue deskribi la legajon kaj poste fari la lernejajn taskojn, ĉar, mi juĝis, estas certe multe pli bone, havi malbone plenumitajn lernejotaskojn ol malbonan deskribadon de la legaĵo, kiun mi devas montri al la patro.

Nu, ankaŭ tiu posttagmezo pasis, mi estis skribinta senhalte; fariĝis vespero kaj mi fakte estis plenuminta la tutan skriblaboron. Post la vespermanĝo mi tuj kaj tute nepostulite montris mian kajeron al la patro; sed ĉi tiu, apenaŭ ekrigardinte ĝin, furiozis, dirante: Ĉu ci skribis per lignopeceto? Klaĉ, klaĉ — du vangofrapoj brulis sur miaj vangoj.

Tute konsternite kaj plorante mi tiun vesperon enlitiĝis.

Mi nun ne plu parolu pri tiu tempo, ĉar unu tago similis la alian; por la daŭro de kelkaj semajnoj mi ĉiutage skribis ĝis la vespero, kaj vespere la patro vangofrapis min, aŭ mi ne ricevis manĝaĵon. Sed ĉio ja iam finas, kaj ankaŭ tiu

turmentegado preterpasis, ĉar iom post iom la patro forgesis doni al mi taskojn, eble pro tio, ĉar la afero tedis lin, aŭ eble pro tio, ĉar li konatiĝis kun virino, kiu poste fariĝis mia dua patrino. — — — — —

Sed unu tago en la semajno ĉiam estis por mi feliĉa tago: ĝi estis la mardo. Mia patro estis prezidanto de kegloklubo, kaj ĉiumarde vespere de post la naŭa ĝis noktmezo, la unua, aŭ dua, mi funkciis kun ankoraŭ alia knabo kiel keglobubo. La keglejo apartenis al la posedanto de nia domo, kaj vespere je la oka mi jam iris malsupren. Ni purigis la keglovojn kaj laŭbezone ekbrulis la fajron en la forno; poste ni buboj iomete keglis, ĝis venis la klubsinjoroj. Vere, tiuj mardovesperoj estis la plej feliĉaj de preskaŭ tuta mia juneco, kaj mi ofte kriis tiel laŭte: kvin, ĉiuj naŭ, ke mia patro ofte kriis: Kaĉjo, ne tiel laŭte, ni sufiĉe bone aŭdas. Ja, mardovespere mia patro nomis min Kaĉjo. Je la deka ni buboj ricevis ĉiu unu glaso da biero, kaj la tutan vesperon entute kvar glasojn, kiujn ni ĉiam rapide eltrinkis, ĉar ni tre ŝvitis. Je la dek-dua ni ricevis grandegan buterpanon kun multe da kolbaso, eĉ ŝinkon oni ofte estis surmetintaj — ho, kiom bongustaj ili ĉiam estis! Sed apenaŭ englutinte mian panon mi kutime fariĝis malgaja, ĉar miaj pensoj jam okupiĝis pri la morgaŭa mateno. Merkredon matene de la sepa ĝis la oka mi havis en la lernejo natursciencan lecionon, kaj tiu instruisto, kiun ni ĝenerale nur nomis Frederiko la barbara, estis terure severa, kaj mi kutime ekdormis. Nu, certe oni tre bone scias, kion faras instruisto severa, se iu dormas, aŭ ne sufiĉe atentis! Krome mi kutime ricevis dum ĉi tiu horo sufiĉan nombron da bastonbatoj, ĉar naturscienco estis unu el miaj „malfortaj flankoj“, ĉu miro?! Mi ja neniam venis nek en la arbaron nek sur la herbejon, mi nur ĉiam devis labori, laboradi. — — — — —

(Finota)

La ĝenanta enigmo

En somera vespero, kiam Bob, farante sian prosanan marŝekzercadon, laŭ ĉiuposttagmeza kutimo promenis okcidenten de Dundee, la pipon en la buŝo kaj la manojn en la poŝo, li renkontis sian amikon kaj klienton, Willie Watson, ĉe la fino de Hawkhill.

„Ĝuste la homo, kiun mi deziras vidi,“ ekdiris Willie „mi ĵus pensis pri vi“.

„Tio estas bonŝanca,“ rediris Bob kun rideto.

„Ĉu vi bezonas surtuton por la vintro, aŭ kion?“

„Ne, ne nuntempe — sed mi scias, ke vi estas lerta solvanto de enigmoj“.

„Jes, sendube,“ diris Bob kun ruza palpebrumo.

„Nu, jen nukso por fendi, kaj se vi malsukcesos eligi la kernon, transdonu ĝin al via edzino, Bob, por ke ŝi provu. Aŭskultu!“

Du viroj rigardadis bildon, kaj unu diris al la alia: „Kia parenco de vi estas la persono en tiu bildo?“ La demandito, fingromontrante la bildon, respondis:

„Fratinojn kaj fratojn mi tute ne havas; tamen la patro de tiu viro estas la filo de mia patro.“

Jen, solvu tion por mi, kiam vi havos liberan tempon, kaj dume: ĝis la revido!“ Kaj kun demona rideto Willie amike manadiaŭis kaj forlasis Bob'on, kiu staris sur la pavimo kaj meditis pri la problemo ĵus ricevita.

„Kial li tiel rapide foriris?“ diris Bob al si. „Post nur unu momento mi povus doni la solvon de tiu simpla enigmo. Ĝi estas absolute tiel klara, kiel A. B. C. Fratinojn kaj fratojn mi tute ne havas, sed la patro de tiu viro estas la filo de mia patro. *Tuts aj!* Ĝi estas ridinde simpla. Fakte, ĝi estas klara kiel taglumo: se la patro de tiu viro estas la filo de mia patro, do la filo de mia patro devas esti la patro de tiu viro; tial la filo de tiu viro devas esti la patro de la patro de tiu viro, kaj sekve mi devas esti la patro de mia patro — ne, atendu momenton! Tio ne povas esti, mi iom konfuziĝas. Ni komencu denove.“

Fratinojn kaj fratojn mi tute ne havas. Tio estas, mi estas orfo. Ni ne tion forgesu! *Tuts ne!* Mi intencis diri, mi estas solinfano. Jen, almenaŭ tio estas decidita. Sed la patro de tiu viro, alivorte, la patro de la persono en la bildo estas la filo de mia patro. *Aj aj!* Mi jam ĝin komprenas! Estas evidente, ke la patro de tiu viro estas la filo de mia patro. Komprenable tiu estas mi. Pro tio mi devas esti la nepo de mia patro. Jes, tiel estas, — sed haltu! La nepo de mia patro! Je mia kredo! Mi apenaŭ povas esti tio, ĉar tiuokaze mia patro estus mia avo.

Loŝ! Estas tre strange! Ni komencu denove.

Fratinojn kaj fratojn mi tute ne havas, — kion vi junuloj alrigardaĉas?“

Tiu subita demando estis parolata al aro da geknaboj, kiu kolektiĝis en admiranta rondo ĉirkaŭ Bob, dum li staris sur la pavimo, kie li unue renkontis Willie Watson.

„Li estas freneza,“ kriis bubo kaj deprenis ĉapon de la kapo de knabo kaj ĵetis ĝin al la piedoj de Bob kaj samtempe rapidege forkuris.

„Li estas lunatikulo,“ kriis la bubaro, dum ili ĉirkaŭdancis Bob'on kaj ektiris liajn baskojn.

Sed Bob apenaŭ aŭdis la kriadon, tiel profunde li eniĝis en la misterojn de la enigmo, kiu unuavide ŝajnis tiel facila. Li rapide promenis okcidenten, per la mano premante la barbon, kaj per la okuloj fikse rigardante teren. Li estis tre profunde okupita pri la problemo; sen ia dubo, ĝi ne estis tuj solvebla.

„Nu, aŭskultu,“ senpripense ĵuris Bob al si, „mi solvos ĉi tiun malbenindan problemon, antaŭ ol mi hejmeniros.“

Li preterpasis Windsor-straton kaj neflankiĝante daŭrigis sian iradon, laŭte kaj nekonscie ripetante la distrajn kaj konfuzajn vortojn.

Pli kaj pli malproksimen li marŝis, kaj lia vizaĝo laŭgrade alprenis aspekton de pli profunda konfuziĝo. La homoj survoje preterpasantaj haltis, por lin rigardi, ĉar ili vidis viron jam tute lacan kun plenmano de la propraj haroj, kaj aŭdis de tempo al tempo sensencaĵojn pri „la patro de tiu viro, kiu estas la filo de lia patro“.

„Jen lunatikulo liberiĝinta,“ diris unu vojiranto al alia.

„Verŝajne vi tuj vidos liajn gardistojn je liaj kalkanjoj,“ estis la respondo.

„Kompatindulo“, diris la unua. Ĉu vi rimarkis liajn okulojn, kiel sovaĝe ili brilas! Li ektimigos iun, mi pensas, ke ni devus lin sekvi kaj kapti, antaŭ ol li faros malbonon aŭ al si mem, aŭ al iu alia.

Je tiu tempo Bob tiel konfuziĝis pro la mal-simpleco de la problemo kaj tiel firme kaptiĝis en ĝia retaro, ke oni aŭdis lin eldiranta laŭvoĉe, ke li devas esti sia propra patro, eldiroj, kiuj konkludigis al la preterpasantoj, ke li estas tute freneza. Nepripensante sian faron Bob daŭrigis sian vojon, ankoraŭ ripetante la vortojn:

„Fratinojn kaj fratojn mi tute ne havas; tamen la patro de tiu viro estas la filo de mia patro.“

Tiel ofte li ĉi tion ripetis, ke la vortoj fine fariĝis rimo en lia kapo, poste ario alligiĝis, kaj ree kaj ree li kantetis ĝin, ĝis la kapablon, solvi la enigmon, li tute perdis. Li estis en labirinto de iluzioj, kaj „lia supra etaĝo estis renversita.“

„Je bonuloj vivantaj,“ diris Bob, dum neklara sento pri la ridindeco de liaj faroj venis al li, tio fariĝas terura, mi devas havigi al mi helpanton por la solvo de ĉi tio enigmo, alie mi ne hejmenvenos hodiaŭ nokte. Mi devos ĉirkaŭvagadi kiel perditulo serĉanta ripozon, sed neniam ĝin trovanta.

Ho! Kial mi ĝenas mian cerbon pri tiu peco de sensencaĵo kaj perfidaĵo! Ha! jen policano ĉi tien venanta. Mi sciiĝos, ĉu li povos helpi pri la solvo. He, sinjoro policano, mi volas fari al vi unu simplan demandon, kaj mi deziras nur rektan respondon. Aŭskultu! Fratinojn kaj fratojn mi tute ne havas, sed la patro de tiu viro estas la filo de mia patro. Nu, kion mi volas scii, estas, kia parenco de mi estas la patro de tiu viro. Ĉu vi povas tion respondi? Kaj, pro ĉielo! ne diru, ke vi ne scias; alie mi pensas, ke mi perdos mian rezonkapablon. Ho! diru, ke vi scias, sinjoro policano, kaj tiel levu for de mia spirito tre pezan ŝarĝon.“ „Kompatindulo,“ diris la policano al si mem. „Mi supozas, ke, kiam

oni lin ne gardis, li forliberiĝis.“ Poste, per trankviliga voĉo, kaj dum li mankaresis Bob'on sur la dorso, li diris:

„Jes jes, mi scias ĉion pri la filo de via fratino. Vi estas bona onklo lia, kiel ankaŭ estis via patro. Jes, jes, via amiko ĉe la granda domo serĉas vin. Venu kun mi, kaj mi rekondukos vin ĝis via hejmo.“

„Pri kio vi parolaĉas?“, diris Bob kun granda surprizo. „Tio, kion mi volas scii, estas: se la patro de tiu viro estas la filo de mia patro, kia parenco mi estas de la patro de tiu viro — ne! de la filo de tiu viro — ne! ankaŭ tio estas malĝusta. Unu momenton, mi komencos je la komenco. Fratinojn kaj fratojn“ —

„Jes jes jes!“ diris la policano. „Mi scias ĉion pri viaj fratinoj kaj — pri viaj fratoj ankaŭ. Jen venas viaj fratoj, por konduki vin hejmen al la granda domo, kie loĝas viaj fratinoj.“

Kaj jen, en tiu momento alvenis la du vojirantoj, kiuj antaŭe rimarkis Bob'on, kaj kiuj pensis, ke li estas lunatikulo liberiĝinta.

„Jen iom da laboro por vi, diris la unua senspire. „Vi devas lin hejmenigi. Vi ne devas permesi, ke li tiamaniere ĉirkaŭvagadu. Oni ne scias, kion li faros.“

„Kaj ni helpos al vi, se li kontraŭbaraktos“, diris la dua.

„Kio estas?“, diris Bob, „Ĉu vi pensas, ke mi estas babilaĉanta idioto? Mi nur faris al ĉi tiu policano unu tre simplan demandon, kaj mi ripetos ĝin por via kontentiĝo, ĉar kvar kapoj estas pli bonaj ol unu. Aŭskultu! Fratinojn kaj fratojn mi tute ne havas, sed la patro de tiu viro estas la filo de mia patro.“

„Jes jes“, diris la policano, forte metante la manon sur la brakon de Bob. „Ĉion ĉi tion vi antaŭe diris al mi, mia bonulo. Venu hejmen, kaj morgaŭ matene vi estos ree tute sana. — Jen, ekkaptu, kaj ni kurigos lin hejmen en du ĝis tri minutoj.“

Kompatindulo, lia kapo estas tre malsana. — Venu, kaj ni akompanos vin ĝis la domo, en kiu vi loĝas.“

„Estas terure, mankas al li la rezonkapablo. Ni zorgu, ke ni ne malpaciĝu kun li, oni diras, ke tio plimalsanigas frenezulojn. Ni cedu al li kaj kredigu, ke li estas tute saĝa.“

„Kio, vi pensas, ke mi estas . . .?“ diris Bob, iom timigita per tio ĵus parolita.

„Ni kredas, ke vi estas kvietita, honesta homo, kiu perdis sian vojon, kaj ni volas rekonduki vin en vian luksan domon, kie estas via hejmo.“ Kaj ili puŝis lin ĝis trotado — la policano ĉe unu flanko, unu el la fremduloj ĉe la alia, kaj la dua ĉe la dorso.

„Sed mi ne loĝas en ĉi tiu strato“, diris Bob, baraktante por sin liberiĝi.

„Ho jes, vi ja tie loĝas, en la jena domo — granda kiel palaco; sed vi forgesis. *Maj!* Vi sendube estas grandulo, se vi povas loĝi en tia luksa domo.“

„Kuniru kiel bonulo kaj ne necesigu, ke ni devu vin treni.“

„Ĉu vi opinias min freneza,“ diris Bob, ankoraŭ baraktante. „Ĉu vi ne scias, ke tiu domo estas la lunatikulejo? Mi ne loĝas tie, vi malsaĝulaĉoj!“

„Ĉu vere? Eble tiel estas, sed ĉiuokaze jen, kie vi loĝas, kaj ju pli baldaŭ vi tie estas, des pli bone estos. Tial venu kiel bona viro.“

„For la manojn, vi malsaĝaj diabloj! Helpon!“ ekkriis Bob. Sed li estis en la manoj de la filistroj, kaj laŭlonge de la vojo oni lin tiradis kaj puŝadis, ĝis fine estis atingita la barilpordo de la reĝa lunatikulejo. Oni sonorigis, kaj aperis pordisto.

„Jen forkurinta enloĝanto, kiun ni kaptis sur la ĉefvojo kaj alkondukis al vi,“ diris la unua.

„Aj! Kaj mi opinias, ke ne malpli ol dek ŝilingoj estus sufiĉa rekompenco por niaj penoj, tiom multege li baraktadis.“

„Mi ne estas frenezulo, *ili* ja estas frenezaj!“ kriis Bob.

„Tiu viro neniam estis interne de niaj pordoj,“ diris la pordisto ekrigardante Bob'on kun rideto.

„Kaj mi esperas, ke mi neniam estos“, diris Bob fervore.

„Li do tute ne estas freneza“, diris la policano.

„Ĉu mi ne tion jam sciigadis al vi, sensenculo, kaj vi ne volis kredi min! Mia opinio estas vi tri molkapaj idiotoj, kiuj devus esti interne de tiuj pordoj, ĉar vi estas frenezaj, frenezaj kiel leporoj dum Marto.“

„Jen, do, tio ja estas ŝerco,“ diris la unua.

„Jes ja,“ diris la dua, „ĉu ni ne aspektas kiel ŝafoj?“

„Nu nu, ne diru plu ion pri ĝi. Kaj mi vin pardonos“, diris Bob manpremanante ilin ĉiujn, kaj forpromenante for de la lunatikulejo Bob denove klarigis al ili, ke li serĉas solvon de la problemo ricevita de Willie Watson, kaj du horojn poste, ĉe la pordo de la vilaĝa hoteleto, la kvar amikoj disiĝis por ĉiam — kun kvar malsamaj solvoj de tiu diabla enigmo!

El la skota dialekto tradukita de
Alex McCallum, Edinburgh

Ĉe la kombisto — Gimnaziano, kiu ĵus igis tondi siajn harojn, demandas ruĝiĝante:

— Ĉu vi kredas, ke mi havos barbon?

— ???

— Mia patro havis tre belan barbon.

La kombisto iom embarasite:

— Nu, mi opinias, ke vi heredis la ecojn de sinjorino via patrino.

Jam printempa . . .

[1077]

Jam printempa sun' fortiris
De la tero neĝan kruston;
La naturo kun violoj
Jam ornamis sian bruston.

Vent' varmeta kaj facila
Kisas montojn kaj kamparon,
Salutante la birdetojn
Revenantajn en arbaron.

Alaŭdeto en aero
Kantas sian himnon belan,
Laŭdegante ĉiopovan
Patron sanktan kaj ĉielan.

Kampano laborema
Kampon sian ĝoje plugas,
Frugilegoj lin sentime
Krietante ĉirkaŭflugas.

Ho, printempo kun belaĵoj,
Kiam vi sur ter' ekstaras,
Ĉiam al animo mia
Vi predikon mutan faras:

Certe ankaŭ min atendas
Post la morto — vintro mia —
Belprintempo en ĉielo
Ĉe Savinto mia, dia.

Milkó Dobrovoljac, evang. pastro,
Požega (Kroat-Slavonujo)

Marto

[1080]

Pli radiante la suno nun brilas,
Blua etendas sin firmament';
Super la kampo alaŭdoj ektrilas,
Dolĉajn ordorojn alportas la vent'.

Ĝoje la homoj resentas misteron
De la printempo. Marta sopir'
Ree vivigas malnovan esperon . . .
Kantojn eternajn sonigas la lir'.

Margarete Küster

El la vivo kaj sciencoj

Bona konsilo

Ne fariĝu fremdulo en via propra hejmo

Multaj homoj estas hejme*) ĉie, en la literaturo, en la arto, en multnombraj unuiĝoj, en la ĉiutagaj priparolataĵoj, en la plej novaj novaĵoj — nur en sia hejmo ili ne estas hejme. La stimuloj de la ekstera vivo iom post iom sufokas la ĝojon pri la propra hejmo, kaj dum tiaj homoj ekstere estas glorataj pro sia vigla intereso pri la plej diversaj demandoj, ili estas fremduloj en sia familio. Ekzameni foje profunde viajn tiel-nomatajn „neprajn devojn“ eksterfamiliajn, ĉu vi ne povas forĵeti kelkajn el ili, ne ŝargante per tio vian konsciencon, kaj dediĉu vin al viaj familiaĵoj! Tiam vi trovos stimulojn, pri kiuj vi neniam pensis; tiam sur via vivovojo ekfloros mirindaj floroj, kiajn vi neniam vidis. Kaj en la trankvilo iom post iom retrovos sin ankaŭ via animo, kiu longe estis fremda al vi kaj sopire vin serĉis.

Pastro Dr. phil. *Herrmann Dechent*,
konsistoriano, *Frankfurt a. M.*
(Laŭ *Allgemeiner Wegweiser*)

Sur „Ellis Island“, New York City

La enmigrantoj, kiuj elŝipiĝas sur Ellis Island, New York, estas zorgeme demandataj pri multaj aferoj, antaŭ ol oni permesas al ili, eniri Usonon. La tasko sciigi, ĉu iu enmigranto estas spirite mankhava — kvazaŭa frenezulo — estas prizorgata de Dro Howard A. Knox, la helpa ĥirurgo de la U. S. Public Service (publika sanservo).

Inter aliaj demandoj farataj troviĝas la jenaj:

Kiom da jaroj vi havas?

Kiom aĝa vi estis antaŭ kvar jaroj?

Per kiu vaporŝipo vi ĉi tien vojaĝis?

En kiu jaro vi naskiĝis?

Kiu urbo estas ti ĉi?

Kiom faras ses kaj ses?

Kiom faras ses kaj sep?

Ĉu vi povas nombri de unu ĝis dek?

Kiu estas la reganto de via hejmlando?

Ĉu vi parkere scias la adreson de la persono, kiun vi volas renkonti ĉi tie?

Tiaj demandoj ŝajnas esti sensencaĵoj, sed al tiuj, kiuj faras ilin al miloj da enmigrantoj, ili estas tre gravaj kaj scidonaj.

Alia demando estas: Kiom longtempe vi vizitis iun lernejon? — Antaŭ ol aŭdiĝas la ĝusta, senpera respondo, la demandito ĝenerale faras ĉirkaŭ-iran respondon. La irlandano tuj elpuŝas „Kio?“

La skoto silentas dum momento, kaj poste faras senperen respondon. En preskaŭ ĉiu okazo la anglo ripetas la demandon kaj atentigas, ke li miras pri tia demando. Male de tio la franco tuj kaj senpere respondas; same la germano. Ne-niu el tiuj prokrastas la respondon. Sed, kiam oni faras la demandon al hebreo, li ŝanceliĝas, kaj oni devige ripetas la demandon. La turko aŭdas la demandon kun suspektemo, same ankaŭ la arabo. La ruso kaj polo senhezite respondas, se ili bone komprenis.

Preskaŭ ĉiuj el la frenezuloj, kiuj elŝipiĝas sur Ellis Island tiu- aŭ ĉi-tiumaniere vidigas siajn intelektmankojn. Antaŭ nelonge enmigranto staranta ĉe fenestro de la atendejo diris, ke la statuo de libereco estas formaŝanta laŭ la golfeto, ŝvingante la brakojn. Li konsilis, ke oni pro ĝia savo volvu ŝnuregon ĉirkaŭ ĝi kaj forte fiksi ĝin al la tero. Tiun fremdulon oni tuj hejmenigis.

Johano L. Stanyan, Montpelier

Rimarkinda elpenaĵo por eklumigi stratlanternojn

Antaŭ nelonge en la gazetaro aperis la pri-skrubo de genia elpenaĵo, per kiu oni proponas lumigi la kanalon de Panama. La rimedo estas acetilena gaso, kaj la funkciiga povo troviĝas en la suna varmo. Kupraj cilindroj, kiuj estas alligataj al la lumturoj kaj kiuj estas malkovrataj en la atmosfero, dilatiĝas, post kiam la suno leviĝis; kaj tiu ĉi dilato*) fermigas la valvojn, kiuj kontrolas la gasfluadon al la flamingo. Vespere, kompreneble post sunsubiro, la cilindroj maldilatiĝas per la malvarmo, la valvoj malfermiĝas, la gaso ekbrulas per tiel-nomata „pilota ŝprucaĵo“, kaj baldaŭ la granda ŝipirejo kuŝas sub hela lumado.

Tiu ĉi elpenaĵo, oni povas diri, estas nur la aliformigo de meĥanismo, farita de skoto, por eklumigi stratlanternojn. La aparato, kiun oni povas alligi al la ordinara stratlanterno, funkcias laŭ la principo de la gasometro, nur ke oni uzas hidrargon anstataŭ akvo. Interne de la malgranda gasometro la maŝinaro konsistas el ŝtala kupoleteto, kiu portas du plumbajn ŝarĝojn. Forta alfluo de gaso el la gasfabriko plialtigas la kupoleton, kaj tiu procedo funkciigas radon. La rado enhavas truon, kaj kiam ĝi turniĝas, la truo venas kontraŭ la enfluigo de la flamingo, kie tuj aperas la flamo. Male, post kiam la suprenpuŝo de la gaso malpliĝis kaj la gasometro malleviĝis, tiam la rado

*) En ĉi tiu okazo la esprimo „esti hejme“ estas germanismo signifanta: havi rutinon pri io. *La red.*

*) Dilato (fiz.) = *angle*: dilation, *france*: dilatation, *germ.*: Ausdehnung.

returniĝante ĉesigas la gasfluadon, kaj la lumo estingiĝas.

Kelkaj urboj en Britujo kaj aliloke jam akceptis la novan metodon de stratlumado, kaj la faktoj kaj ciferoj, kiujn oni nun komencas publikigi, elmontras, ke ĝi estas plene sukcesa. La ĉefaĵo de la sistemo estas, ke ĉiuj lanternoj, kiel ajn la urbo estas vasta, samtempe eklumas kaj ankaŭ samtempe estingiĝas. Tiamaniere oni povas ŝpari multe da laboro kaj da mono. Kaj la eluziĝadon de la maŝinaro oni povas malpliigi ĝis minimumo.

James Walter, Edinburgh

Ekzamenoj en la norvegaj lernejoj

En la popolaj lernejoj de Norvegujo la ekzamenoj okazas dum la marta monato, sed en la aliaj dum la junia monato. Eble el tio, ke la popollernejoj, farante siajn ekzamenajn taskojn povas labori en malvarmeta vetero, dum la aliaj lernejoj devas plenumi siajn taskojn en la tre varma junia vetero, venas la diferenco inter la rezultatoj de ambaŭ partoj. En la ekzamenoj de la popolaj lernejoj tre malmultaj malsukcesas; sed en tiuj de la superaj lernejoj kutime ĝis 10 el cent malsukcesas. Jes, efektive okazis, ke la duono de unu klasanaro malsukcesis. Dum la pasinta jaro preskaŭ 1000 ekzamenitoj el superaj lernejoj fariĝis studentoj. Kompreneble ne ĉiujn studentojn povas akcepti la universitato de Kristiania. Tamen ĉi tiu universitato havas preskaŭ 2000 enskribitajn studentojn.

Estas plezuro, vidi la „ĝus bokitajn“ studentojn. Iliaj vizaĝoj brilas pro feliĉo kaj kontenteco, dum ili fiere, eble ankoraŭ iom mallerte, portas la tre karan al ili kvastornamitan norvegan studentan ĉapon. La longa nigra kvasto kuŝas plej ofte sur unu (la dekstra) ŝultro. Ili estas karakteriza aperaĵo en la vivo de Kristiania dum la fino de Junio kaj komenco de Julio. Sed tiam, ricevinte libertempon, ili formetas ĉiujn studojn kaj forvojaĝas ien por ĝui la „dolce farniente“ (dolĉan neniofaradon) dum preskaŭ dumonata libertempo.

Bruno Rifling, Bekkelag

Kiel helpi al malsanulejoj?

Tiu ĉi demando estas solvita de la direktoro de grava ĵurnalo Londona kun la helpo de ĉiuj urbanoj. La *Daily Chronicle* eltrovis rimedon, ricevi monon por la urbaj malsanulejoj, petante la civitanojn, ke ili ne plu forĵetu siajn malnovajn ĵurnalojn, senutilajn cirkulerojn, kovertojn kaj alispecajn paperojn, sed ilin kolektu kaj poste donu al speciala kolektanta firmo, kiu vendos ĉion je la profito de bonfarantaj institucioj.

Por faciligi al ĉiuj la kolektadon de tiaj paperaĵoj, la inicianto de la afero havigas al ĉiu postulanto specialan sakon, kiu plenigita estos forprenata, laŭ peto de la prunteprenanto. La demando pri sakoj estas, ĝis nun, tiel granda, ke postulantoj estas devigataj, atendi kelkajn tagojn antaŭ ol ricevi la bezonatan sakon.

Tiu nova maniero, helpi al malsanulejo, estas entuziasme akceptata de ĉiuj, ĉar ĝi estas tre malmultekosta kaj senigas la deziremuojn de iliaj senutilaj paperoj kaj aliaj aĵoj, kiel malnovaj vestaĵoj, aŭtomobilaj kaŭĉukaĵoj, ktp.

La inicianto esperas, ke tia kolektado estos farata ankaŭ en aliaj urboj kun la celo, helpi ian bonfareman institucion.

P. Blaise, London

Festotagoj en Hispanlando

En Hispanlando ekzistas multaj personoj, kiuj deziras multigi la festotagojn, nome: komizoj kelneroj kaj aliaj, kiuj enspezas ĉiumonate certan salajron, tute egale, kiom granda estas la nombro de la festotagoj. Tial oni ja povas facile kompreni, ke la pasintjara ordono de l' Papo pri malmultigo de festoj, estis malagrable por multaj junaj personoj, sed ĝi estis tre kontentiga por laboristoj kaj aliaj, kiuj enspezas nur laŭ la tagoj, dum kiuj ili laboris.

Okaze de la ŝanĝo de l' festo de Sankta Johano okazis kelkaj spritaĵoj. Ekzemple: Iu gratulis sian amikon Johano, laŭ la nova ordono, je dimanĉo, sed la amiko respondis: „Ne gratulu min hodiaŭ, ĉar mia nomfesto estos postmorgaŭ, la 24an de Junio“. Alia ne gratulis sian amikon dimanĉe, sed la 24an, laŭ la malnova ordono, kaj la amiko respondis: „Kial vi gratulas min hodiaŭ? Mia nomfesto estis antaŭhieraaŭ, dimanĉe.“

En Hispanlando oni kutimas festi la antaŭvesperojn de Sanktaj Johano kaj Petro per granda gajeco en la apudurbaj promenejoj kaj ĝardenoj. Oni dancas en tiuj lokoj ornamitaj per gajkoloraj lumiloj, oni vespermanĝas, trinkas kaj eĉ drinkas, oni aĉetas bonodorajn florojn kaj herbojn; oni manĝas multajn kringojn kaj tortojn, kaj oni ne iras hejmen aŭtaŭ la frua mateno. Kompreneble en tiaj festoj partoprenas nur la labora popolo, kaj oni nomas ilin *verbena* (elp. same) kio signifas „vesperfesto“. Dum la festo oni eksplodigas multajn raketojn kaj similaĵojn, kaj oni aranĝas grandajn flambrulaĵojn. En la pasinta jaro Sankta Johano havis du *verbenos* tial, ke oni vesperfestis laŭ la nova kaj laŭ la malnova ordono, sed tiu de la sabato (laŭ nova ordono) estis multe pli sukcesa.

Antonio Pla, Barcelona

**Samideanoj! Aliĝu al la
9a Germana Kongreso en Leipzig!**

Humorajoj

Ciklisto falante elartikigis sian piedon kaj devis resti en lito.

— Patrino, — demandas lia filineto, interrompante brodadon, kiun ŝi faras por la naskiĝtago de sia patro — ĉu oni fortranĉos la kruron de paĉjo?

— Ho ne, malsaĝulineto! Kia ideo! Kial vi demandas tion?

La infano iom ruĝigante: Ĉar mi tiam bezonus brodi nur unu pantoflon.

*

Dekjara knabeto gratulas sian avinon je ŝia naskiĝtago.

— Avino, li diras, mi deziras, ke vi restu viva ĝis la fino de viaj tagoj.

— Ho, kara Peĉjo, mi certe ne vivos tiel longe

≡ Tra Esperantujo ≡

Deka Universala Kongreso de Esperanto Karavano kaj Konkurso

La ĝeneralaj sciigoj pri la preparoj de la Deko en Paris aperas regule en eldono A de G. E. Ĉi tie ni volas atentigi nur pri du specialaj aferoj, kiuj interese ankaŭ la legantojn de eldono B.

Unue ni petas, ke oni ne malatentu la anoncon pri la *speciala karavano*, kiun Germana Esperanto-Asocio kaj nia gazeto aranĝos por la vizito de la kongreso. Dank' al bonaj rilatoj ni povas efektiviĝi la karavanon ĉiukaze kaj por eksterordinare malalta prezo. La detaloj pri la vojaĝo aperos en la aprila numero A de G. E.

Due ni publikigas ĉi-sube la regularon de *Oratora Konkurso*, kiun la Komitato de la Deko aranĝos, sekvante la bone sukcesintan unuan ekzemplon de la Naŭa en Bern. La organizanto de la Oratoro Konkurso de la Deko estas nia tre kapabla samideano *René-Charles Pichon*, kiu en Bern ricevis la unuan premion en la Oratoro Konkurso de la Naŭa.

Jen la supre dirita regularo aperinta en la „Gazeto de la Deko Kongreso“:

1. Oratora Konkurso okazos dum la Deko Universala Kongreso de Esperanto. Povos partopreni en ĝi ĉiu kongresano, post aprobo de la juĝantaro. Povas ĉeesti ĝin ĉiu kongresano.

2. La enskribiĝojn oni akceptos en la Akceptejo, ĝis mardo, 4a de Aŭgusto, entenata. Oni povos konkursi sub pseŭdonimo.

3. La enskribitoj devos partopreni en antaŭkonkursaj provoj; tiuj provoj ne estos publikaj. La provantoj devos pritrakti lote elektitan temon dum 10 minutoj.

4. Maksimume 10 el la provintoj partoprenos en la konkurso. Ili parolos maksimume dum 15 minutoj.

5. Okazos solena disdonado de la premioj.

6. La nesukcesintaj enskribitoj laŭvole ricevos komuniĝon de siaj notoj.

Noto — Ĉiuj supre ne aluditaj aranĝoj estos fiksataj de la juĝantaro. Pluajn informojn ni baldaŭ publikigos. Ni tre konsilas al ĉiuj parolistoj, speciale ekzercigi, por havigi al nia dua konkurso brilan sukceson.

Fine, la tagon mem de la konkurso, la kongresanoj ekscios kun agrabla surprizo gravan novaĵon en la aranĝo de l' konkurso.

* * *

La gazetoj

La kongresanoj povas tre facile ricevi en Parizo siajn gravajn naciajn gazetojn: en multaj vendejoj (*kiosques*, kioskoj, elp. kjosk), ĉefe sur *les grands Boulevards* (la grandaj bulvaroj, le grang bulvar*). Sed la prezo estas ordinare la duoblo aŭ la trioblo de la enlanda.

Estas ankaŭ naciaj en Parizo presataj gazetoj: ilin legas la fremduloj loĝantaj en Parizo, kaj la junuloj, kiuj volas havi eksterlandan *chic* (ŝik, dandekon). Tiaj gazetoj estas *New-York Herald* (European Edition), *Daily Mail* (id.), *Pariser Zeitung*, *Pariser Presse*, *La estonto* de Vladimir Burcef, ktp. Multaj el la rusaj aŭ turkaj gazetoj estas revoluciemaj. La diritaj gazetoj estas preskaŭ ĉie haveblaj, ordinare po 10 centimoj.

La fremduloj, kiuj iomete scipovas la francan, aĉetu la francajn ĉiutagajn ĵurnalojn, po 5 centimoj (escepte *Excelsior* (Ekselsjor), *Le Journal des Débats* (le ĵurnal de deba), ĉiam nomata *Les Débats* (le deba), *Le Figaro* (le Figaro), po 10 cent., kaj *Le Temps* (le tang) po 15 cent. La politikaj gazetoj interesas nur la francojn.

En ĉiuj gazetoj la sciigoj je tutmonda intereso troviĝas sur la unua paĝo, aŭ sur la 3-a aŭ 4-a, en *Dernière heure* (lasta horo, dernjer ŝr), alivorte *dernières nouvelles* (lastaj novaĵoj, nuvel).

La ĉefaj matengazetoj estas *Le Journal* (le ĵurnal), tre ampleksa, *La Matin* (le mateng), kies lerte aranĝitaj titoloj ebligas travidi per unu rigardo la tutan novaĵaron, ambaŭ neŭtralaj; *Le Petit Parisien* (la Parizaneto, le peti parizjeng), la plej granda ĵurnalo en la mondo (1 550 000 ekz.), respublikana; *Le Petit Journal* (la ĵurnaleta, ĵurnal), mezrepublikana; *Le Figaro*, mezopinia, bonedukita kaj literatura; *L'Echo de Paris* (leko d' pari) konservativa. *Excelsior* enhavas ĉefe fotografaĵojn, tre rekomendinda ĝi estas por ĉiuj.

Posttagmeze eliras *La Patrie* (la Patrujo, la patri), *La Presse* (la Gazetaro, la pres) kaj *L'Intransigeant* aŭ *L'Intran* (la Necedema, l'engtrang), ĉiuj konservativaj, enhavas ofte neaŭtentajn novaĵojn, *canards* (anasojn, kanar). Ĉirkaŭ la kvina aperas *Le Temps* kaj *Les Débats*, ambaŭ tre seriozaj, mezrepublikanaj kaj literaturaj. La eksterlandaj informoj de *Le Temps* estas la plej certaj.

La gazetojn oni povas senpage legi en la kafejoj kaj kombejoj; — la neinteresaj estas ofte okupataj de neniu kliento.

Sed la plej bona rimedo, agrable informiĝi pri la aktualaj, estas viziti kinematografejon, kie la tutmondaj okazintaĵoj estas prezentataj en filma idiomo, tuj komprenebla, ne enhavanta eĉ 16 regulojn.

M. Z. A.

El Kongresa Gazeto (Marto)

*) Akcentu ĉiam la lastan silabon, iomete trenigante la voĉon.

Kunveno de stenografiistoj dum la Deko en Paris — Ĉiulandaj kaj ĉiumetodaj stenografiistoj esperantistaj, kiuj intencas viziti la Dekan Kongreson, estas petataj, sciigi pri sia aliĝo la direktoron de la gazeto „Fluganta Skribilo,” S-ron *P. Flageul*, 9, B-d Voltaire, *Issy-les-Moulineaux* (Seine, Francujo). La komitato de la gazeto intencas aranĝi dum la Deko specialan kunvenon de stenografiistoj, se ĝi ricevos sufiĉan nombron da respondoj. Do la stenografiistaj Dekanoj skribu kiel eble plej baldaŭ, ĉu ili aprobas la ideon kaj kiu el ili partoprenos la kunvenon, por ke la necesaj aranĝoj povu esti farataj.

*

Bildoj de Paris kaj ĉirkaŭaĵo — La kongresanoj de la Deko povas akiri ĉe nia konata samideano S-ro *Ch. Verax*, redaktoro de „*Scienca Gazeto*,” 35 Bd. Arago, *Paris*, tre belajn survitrajn bildojn por stereoskopoj de la ĉefaj vidindaĵoj de Paris kaj de la ĉirkaŭaĵo de Paris: *Pierrefonds* kaj arbaro de *Compiègne*, *Provins* kun ĝiaj interesaj ruinoj, la valo de *l'Oise* kun ĝiaj tre belaj preĝejoj, arkitekturaĵoj, la fama arbaro de *Fontainebleau* ktp.

Landaj kongresoj kaj diversaj kunvenoj

La Sepa Brita Esperanta Kongreso okazos en *Sheffield* de la 30a de Majo ĝis la 2a de Junio 1914. La kongresurbo, mondfama pro la tie fabrikataj tranĉiloj, estas tre vizitinda urbo, kiu enhavas preskaŭ duonmilionon da enloĝantoj kaj, pro ĝia mezlanda situacio, estas facile atingebla el ĉiu parto de Britujo.

En ĝiaj ŝtalfabrikejoj, amasigitaj apud la fervojo, kie la fumtubegoj similas al arbotrunkoj en arbarego, oni povas vidi mirindaĵojn; kaj en la fabrikejoj de arĝentaĵoj oni trovas la plej belajn artoplenajn faraĵojn.

Kelke da parkoj kaj interesaj muzeoj troviĝas en la urbo.

Ĉe la universitato la fakultato de aplikata scienco estas unika pro ĝia kompleteco. Studentoj el malproksimaj landoj, eĉ ĥinoj kaj japanoj, tie studadas la metalurgion de ŝtalo ktp.

Proksime al la urbo etendiĝas monteta kamparo kaj erikejoj kun multaj vizitindaj urbetoj kaj vilaĝoj.

Inter la kongresaj aranĝoj troviĝas la jenaj:

Sabaton: Oficiala akcepto kaj koncerto. **Dimanĉon:** Esperantaj diservoj. **Lundon:** Ĉiujara kunveno de la Brita Esperanta Asocio. Vizito al *Eyam*, kaj la Kongresa Balo.

Eyam estas malgranda vilaĝo en *Derbyshire*, dek tri mejlojn de *Sheffield*. Ĝi estas pitoreska vilaĝo kun nereкта strato kaj grizŝtonaj dometoj kaj preĝejo malgranda, simpla kaj antikva.

En la jaro 1666 teruriga epidemio, la pesto, vizitis la kvietan vilaĝon. La enloĝantoj sub la konsilo de la tiama parohestro, pastro *Monpesson*, decidis resti en la vilaĝo kaj ne per forkuro disporti la epidemion en aliajn vilaĝojn. Ili restis, kaj pli ol tri kvaronoj de la vilaĝanoj herooj mortis de la epidemio. Dum la epidemio la vilaĝanoj diservis en valetomomata „*Cucklett Dell*,” kaj en tiu sama loko ĉiujare okazas memoriga diservo.

La Ŝefildanoj plezurege bonvenos ĉiujn fremdlandajn samideanojn, kiuj povos viziti la urbon dum la kongreso.

La kongresaj sekretarioj sendos ĉiun bezonatan sciigon al vizitontoj.

N. W. Roberts, W. Hagon

Hoŝ. Sekretarioj *Y. M. C. A.*, 49 *Fargate, Sheffield*

Unujara sperto pri la Ĉekbanko Esperantista

Rusa samideano sendis al *Brita Esperantisto* la ĉi-suban interesan noton, kiun la dirita gazeto publikigis en sia februara numero:

„Mi klare komprenis la utilecon de la Ĉekbanko, sed mi mem estis mirigita de jena kalkulo, kiun mi faris pri unujara konstato: dum unu jaro mi sendis per transpagiloj 51 Sm. al 30 personoj. Se mi uzus rusan poŝton, mi pagus por 30 poŝtmandatoj 3 Sm.; jen ŝparo da mono, proksimume 6 0/0. Sed krome, mi devus uzi tempon por skribi tiujn mandatojn, por atendi ĉe fenestreto kaj iufoje por piediri oficejon. Laŭ modesta kalkulo tio faras 500 minutojn aŭ ĉirkaŭ 8 horojn. Kalkulante unu horon je 1 Sm. mi ricevus fine ŝparon de 11 Sm. aŭ ĉirkaŭ 22 0/0 da ŝparo!”

Oni vidas, ke la utiligo de la Ĉekbanko vere donas profiton, kaj pro tio ni nur povas rekomendi la aliĝon al tiu praktika institucio en Esperantujo. Por kontuloj el Germanujo kaj Aŭstrio-Hungarujo la interrilatoj kun la Ĉekbanko estas aparte oportunaj, ĉar la bankejo *Gebr. Arnhold* en *Dresden-N.*, *Hauptstrasse 38*, estas la oficiala korespondanto de la Ĉekbanko por la tri diritaj landoj kaj per siaj peroj ŝparigas poŝtelspezojn al la kontuloj. Do, oni uzu la servojn de la Ĉekbanko kaj pro sia propra profito kaj pro utilo al la Esperanta afero.

G. E.

El la gazetoj

Scienca Gazeto (Januaro 1914) — *Atlantis!* Kiom da misteroj mallumaj tiu sola nomo elvokas el la profundoj de la Oceano Atlantiko, kien, laŭ la sciigoj liveritaj de du dialogoj de Platon, subite fundefalis mirinda granda insulo, kun belegaj, riĉaj urboj kaj temploj, kaj kun potenca popolo! Kion oni devas opini pri tia terura kataklismo, pri la ekzisto de tiu mistera malaperinta lando? Ĉu la rakonto de Platon estas nur elpensita fabelo, aŭ ĉu ĝi estas pravigita de sciencaj faktoj?

Tia estas la temo de belega kaj interesa konferenco, kiun faris, en la Oceanografia Instituto de Paris, tre eminenta geologiisto, S-ro *P. Termier*, membro de la franca Akademio de Sciencoj. La Esperanta traduko de tiu rimarkinda konferenco aperis *in extenso* en la supre dirita numero de S. G. Sendante al ĝia ĉefredaktoro (S-ro *Ch. Verax*, 35 B-d Arago, *Paris XIII*) du internaciajn respondkuponojn, oni ricevos tiun specialan numeron.

Lingvo Internacia (Februaro 1914) — *Paco*, ... Sed kian pacon ni do volas, inter homoj, inter nacioj ... kaj ankaŭ inter ni Esperantistoj? — La pacon ni volas, kies fundamento estas la respekto de ĉiuj sinceraj opinioj, libere esprimitaj, la respekto de ĉiuj karakteroj, de ĉiuj individualaj aŭ naciaj rajtoj. — Tia paco enskribas sur sian flagon apud la vorto *amo* ankaŭ la vorton *volvo*. Ĝi instigas al la agado. Ĝi

estas „aktiva“ paco. — Ĝia metodo ne konsistas en tio, ke ĝi evitas je kiu ajn prezo kaj tuj konflikton. Ĝi scias ja, ke inter homoj kaj nacioj, kiuj ne vegetas, sed vivas, konfliktoj estas fatalaj; sed ĝi penas por ilin malakrigi kaj por solvi ilin laŭ justeco — Ĝi estas la paco per libereco, la paco en la vivo. — Internacia lingvo, tial ke ĝi povas malaperigi multajn malkompreniĝojn, — apud aliaj gravaj, precipe ekonomiaj, faktoroj, — potence helpas al ĝi...“ — *Th. Cart*

Kulturo (Februaro 1914) — La Deko — „... Sed ne sole ekstera sukceso estas dezirata de ĉeestontaro, almenaŭ de plimulto da ĝi. La sukceso devas ankaŭ rilati internan parton de la kongreso. Ni scias bonege, kiel pezmova estas laboro de tia amasego, kia certe en Parizo kunvenos, por vere labori estas multe pli kapablaj fakaj kunsidoj, kiuj certe estos aranĝataj, kunsidoj de instruistoj, kuracistoj, scienculoj, socialistoj ktp. Tasko de tiuj kunsidoj estos, aldoni al la kongreso internan valoron kaj prizorgi internan sukceson de la Deko. Ĝis nun, kiel multaj scias, tiuj ĉi kunsidoj estis rigardataj kiel pli-malpli negravaj, ne tro signifaj, iliaj aranĝintoj en la lasta momento ilin anoncis sen iu ajn preparo, programo, kaj multfoje la ĉeestantoj forirante de l'kunsido, flustris: „Ni perdis la tagon.“ — Jus (Ĝuste) al preparo de tiuj ĉi kunsidoj oni devas dediĉi same tiom da tempo, kiom da ĝi dediĉas la aranĝantoj al ĉefa kongreso, niaj laboremaj samideanaj en Parizo. En ĉiuj urboj, kluboj kaj unuigoj oni preparolu jam de nun tiujn fakajn kunsidojn, en fakaj organizaĵoj oni elektu komitatanojn, kiuj kolektus jam nun la proponojn pri-traktotajn; nur tiam, se oni tiamaniere semos, la rikolto estos kontentiga, nur tiam la kongreso havos krom sia ekstera sukceso ankaŭ la internan, nur tiam kongresanoj ne helpas sole al sia refreŝiĝo, sed al refreŝiĝo de la tuta movado esperantista.“

La Revuo, kiu nun, post la bedaŭrinda morto de sia fondinto kaj ĝistiam redaktoro Carlo Bourlet, staras sub la lerta redaktado de S-ro *F. de Ménéil*, ĉesigis la publikigon de la Zamenhofa traduko de la Biblio; la daŭrigo aperos nur en libra formo. Anstataŭ tio nia Majstro nun publikigas en la „Revuo“ sian tradukon de la fama verko „La rabeno de Baharah“ de la germana poeto Heinrich Heine. Ĉu estas necese, speciale rekomendi la legadon de tiu ĉi traduko? Ni opinias, ke ne, ĉar la titolo de la verko kaj antaŭ ĉio la persono de l' tradukinto per si mem estas la plej bona rekomendo. Ankaŭ la cetera enhavo de la gazeto estas ĉiam interesa kaj kiel eble plej diversa; specialan atenton meritas la konstanta rubriko „Internacia vivo“, kiun S-ro *Daniel Equem* lerte redaktas. — Ne tro grava, sed tamen sufiĉe atentinda ŝanĝo en la aranĝo de la „Revuo“ estas farita de ĝia nuna redaktoro: la „Feliĉtono“, t. e. la raportoj pri la movado en Esperanujo, ne plu aperas sur la ruĝaj, aldonaj folioj, sed sur la ĉefaj, blankaj, kaj tiamaniere la rubriko nun apartenas al la enhavo de la gazeto mem.

*

Argus

Enhavo de G. E. 3 A: Grava avizo! — Leteroj al nova esperantisto: 2. Kiel mone subteni la Esperanto-movadon? — Nia gazetara mizero — 9. Deutscher Esperanto-Kongreß — Deko Universala Kongreso de Esperanto — Kroniko el germanlingvaj landoj — Internationale Esperanto-Bewegung — Esperanto-Sprachecke — Das Jahrbuch der U. E. A. für 1914 — *Für und*

wider: Esperanto im Parlament — Esperanto im Gebrauch — Diversaj komunikoj — Bibliografio; Diversaj eldonaĵoj; Gazetoj; Redakciaj respondoj — *Oficialaj sciigoj de Germana Esperanto-Asocio (G. E. A.):* Bondeziro; Rundschreiben Nr. 26 — Offizielle Gruppenliste des Deutschen Esperanto-Bundes (E. V.), Nachtrag I.

El la vivo esperantisto

Edziĝo: La 15an de l' pasinta monato S-ro *Dro jur. Heinrich Arnold* el Dresden edziĝis kun F-ino *Lisa Mattersdorf* el Dresden.

Ni kore aliĝas al la bondeziroj, kiujn la estraro de G. E. A. en la oficiala parto de tiu ĉi numero prezentas al sia fervora kaj lerta kasisto kaj al lia estimata edzino. Ankaŭ ni deziras, ke la vivo de la novaj geedzoj estu konstante feliĉa! *Germ. Esp.*

Diversaj komunikoj

Alvoko al ĉiuj spertuloj pri Esperanto, precipe al la Lingva-Komitato

1) Laŭ instigo de l' S-ro prezidanto de la Lingva Komitato estas starigita *Subkomitato por esplori la verkojn tradukitajn el la germana lingvo en la Esperantan.* Germanlingvanoj estas ĝentile petataj, kunhelpi en tiu laboro. Jen la tasko de l' kunhelpantoj: Zorge tralegi la esplorotan verkon, dum la legado noti ĉion, kio ŝajnas rimarkinda; skribi la notojn sur papero unuflanke, eventuale elĉerpi el tiuj notoj interesajn ekstraktojn por la „Oficiala Gazeto“. La laborojn oni sendu al la adreso de l' subskribinto. Jen listo de libroj, kiujn oni devas esplori unuavice: *Bendix*, La geservistoj; *Boelsche*, Unu ĉapitro el la ama vivo en la naturo; *Carmen Sylva*, Sufero; *Ekstein*, La vizito en la karcero; *Fouqué*, Ondino; *Goethe*, La gefratoj; *Goethe*, Ifigenio en Taŭrido; *Goethe*, Hermano kaj Doroteo; *Grillparzer*, La monaĥejo en Sendomir; *Grimm*, Elektitaj fabeloj; *Heine*, Reisebilder; *Heyse*, Edziĝa festo en „Capri“; *Lessing*, Minna de Barnhelm; *Putlitz*, La glavo de Damokles; *Reuter*, Kio povas okazi, se oni donacas surprize; *Schiller*, La nevo kiel onklo; *Schiller*, Wilhelm Tell; *Schiller*, La rabistoj; *Storm*, Immenlago; *Tieck*, La blonda Ekbertoj; *XX*, Tri unuaktaj komedioj.

Ĉiu, kiu posedas unu el la diritaj verkoj kaj povas partopreni la esploran laboron, bonvolu skribi al mi, kiun aŭ kiujn librojn li esploros kaj kiam li povos sendi la rezulton de la esploro.

2) Ĉar estas ankaŭ tre dezirinde, ke verkoj esperantigitaj estu kritikataj de personoj, kies gepatra lingvo ne estas la sama kiel tiu de l' originalo aŭ de la tradukinto, mi tre petas la *germanlingvajn* samideanojn, ke ili komuniku al mi siajn *rimarkojn pri legitaj libroj el negermanaj literaturoj*, por ke mi ilin konigu al la koncernaj subkomitatoj. Same mi petas la *negermanajn* samideanojn, ke ili sendu al mi siajn *rimarkojn pri germandevenaj literaturaĵoj*, ĉar alilingvano ofte pli klare ekkonas, kie naciisma traduko malklariĝas iun tekston.

Por la Subkomitato germanlingva: *P. Christaller*, Neue Weinsteige 61, Stuttgart.

German-Esperanta tradukado

Nia alvoko pri tradukado de kelkaj germanaj verkoj trovis tiom grandan eĥon ĉe la tuta germana esperantistaro, ke ni ne scias respondi tiel rapide al ĉiuj anoncintoj; ni do petas pardonon kaj paciencon.

Kun granda ĝojo ni povas konstati, ke la ideo kiun ni publikigis, vekis grandan emon, pligrandigi per komuna laboro la german-esperantan literaturon; estas ja tute kompreneble, ke la germana popolo de poetoj kaj pensemuloj liveras plej grandan parton da esperantaĵoj, kaj ke ni precipe la famajn verkojn de niaj eminentaj verkistoj konatigu al la tuta mondo.

Kelkaj verkoj jam estas tradukitaj, kaj estas necese, ke ni plej baldaŭ estu informataj pri la komencaj kaj finitaj laboroj, por ke duoblaj penoj estu evitataj.

Klara kaj korekta traduko estas necesa; tial ni de spertaj esperantistoj ekzakte kontroligas ĉiun laboron antaŭ la presado; ni intencas publikigi la tradukaĵojn unue per fama gazeto, disvastiginta en diversaj landoj, por ellogi la lastajn malprecizaĵojn, kaj poste ni kredas la verkon matura, esti envicigata en la literaturan trezoron de Esperanto.

Multaj verkoj estas tiel ampleksaj, ke unu persono sola ne povas traduki ilin, tial estas oportune, se tuta grupo prizorgas la unuan laboron, dividante la verkon en malgrandajn partojn, kiuj estas hejme tradukataj de la diversaj anoj, por povi preparoli la laborojn kune dum la kunvenoj. Je tiu okazo estas dezirinde, ke fine la tuta tradukaĵo estu revizita de bona konanto de la verkisto, por ke la originaleco ne estu perdita.

Por povi doni la materialon senpere al la presejo ni petas, ke oni skribu tre legeble kaj nur sur unu flanko de la papero.

Ni estas certaj, ke per organizado de la laboro ni gajnos baldaŭ multajn kunhelpantojn, kiuj ĝis nun ne sciis, kion fari kaj kie komenci, kaj ni volonte zorgos pri laŭcela lokado kaj disvastigo de tiuj produktaĵoj.

Württembergisches Esperanto-Institut,
Esslingen a. Neckar

*

La trovemo de la germana poŝto — Antaŭ nelonge mi ricevis poŝtkarton el Usono adresitan:

Al

Germana Esperanto
Librejo

Sternwartenstr. 40.

Kvankam la sendinto forgesis nomi la urbon, la karto atingis sian celon. La poŝtistoj sur la oceana vaporiŝipo, certe ne sciante Esperanton, verŝajne supozis, ke „Librejo“ estas fremdlanda esprimo por „Lübeck“ kaj direktis la karton al nia urbo. Tie ĉi ja ne ekzistas „Sternwartenstrasse“, sed Sternwarte (observatorio). Tial la poŝto sendis la karton al la direktoro de nia observatorio, kiu, ankaŭ ne sciante Esperanton, sed legante la vorton „Esperanto“ en la adreso, transdonis ĝin al mi, ĉar li konas min kiel esperantiston. Mi fine povis sendi la mendon (tiun enhavis la karto) al la ĝusta adreso, la konata Esperanto-Librejo en Leipzig. Cu estus eble, sendi karton el Nord-Ameriko al Leipzig — ne nomante tiun ĉi urbon! — se ne per Esperanto?

Dr. M.

Bibliografio

Ĉiuj libroj markitaj per steleto estas riceveblaj per:

Ader & Borel G. m. b. H., Esperanto-Verlag, Dresden-A. 1,
Struvestraße 40.

(La montritaj prezoj ne entenas la sendkostojn, se tio ne estas dirita.)

Ĉi tie ni recenzas nur verkojn duoble ricevitajn.

* **Elzasaj legendoj** — Tradukis *Charlotte Pulvers* (Esperanta Biblioteko Internacia No. 28). 48 pĝ., 9 1/2 × 14 1/2 cm. — Ader & Borel G. m. b. H., Esperanto-Verlag, Dresden-A. 1. 1913. Pr: 0.100 Sm. [173]

Vera plezuro estas la legado de tiu ĉi libreto. Ĝi enhavas 10 legendojn apartenantajn al diversaj urboj kaj vilaĝoj de tiu lando, kie kuniĝas franca kaj germana influoj. Al la legantoj de Germana Esperantisto la rakontoj estas parte jam konataj. La stilo estas simpla kaj klara, kiel devas esti la stilo de bonaj fabeloj kaj legendoj. Tiujn ecojn bonege konservas la traduko, tial mi rekomendas la legendojn kiel legaĵon por komencantoj same kiel por progresintoj. Ili certe multe agrabligos la lernadon. La libreto estas des pli rekomendinda, ĉar ĝi estas unu el tiuj, el kiuj la lernantoj ne lernos erarojn. Malgraŭ tre severa recenzado (la plej bonajn verkojn oni recenzu ĉiam plej severe) mi trovis nur malmultajn eraretojn: Pĝ. 8: heredanto anstataŭ heredonto. Pĝ. 13: Vi min aŭskultis *per* via boneco kaj ne *per* mia merito; oni devus diri *pro*. Pĝ. 13: *felo* de urso anstataŭ *felo*. Pĝ. 16: „Vi devas esti tre malĝoja“ anstataŭ „Vi certe estas tre malĝoja“.

W. C.

Baumann-Böhringers Lehrbriefe zum Selbststudium der Esperanto-Sprache. 13 Briefe, 16 1/2 × 23 1/2 cm, durchschnittlich je 16 S. stark. — Im Verlage der Elsässischen Esperanto-Centrale, Mülhausen i. Els. — Pr: komplett 4.80 M. [126]

Sufiĉe multaj el niaj ĝisnunaj lernolibroj ja pretendas esti taŭgaj, por lernigi nian lingvon sen helpo de instruanto. Sed certe neniu el ili estas tiel taŭga por tia inst uo, kiel la „instruletoj“ de S-roj Baumann kaj Böhringer. Ĉi tiuj leteroj estas nepre rekomendindaj al personoj, kiuj deziras lerni Esperanton, sed ne havas okazon, partopreni kurson.

La aŭtoroj prezentas en tre detala, klara kaj facilkomprenebla maniero ĉion, kion Esperantano devas scii pri la gramatiko kaj stilo de sia lingvo, kaj ili aldonas bonegan materialon por lingvaj ekzercoj, kiu sendube multe interesos la lernantojn, ĉar ĝi ĉefe koncernas la bezonon de la ĉiutaga vivo. Rilate la lertecon, kun kiu la aŭtoroj plifaciligas la lernadon de nia lingvo, mi nur mencias la modelan pritrakton de „si“ kaj „sia“ kaj la saĝan ŝparemon pri la uzo de la kunmetitaj formoj de l' verbo. Mi neniel dubas, ke persono, diligente tralaborinta ĉiujn leterojn, estos kapabla, kontentige majstri Esperanton. Tial mi eĉ ne ŝanceliĝas, rekomendi la studadon de la jenaj leteroj al tiuj samideanoj, kiuj jam ĝuis kurson por komencantoj kaj poste intencas plivastigi kaj plifirmigi la akiritan lingvoscion.

Pri kelkaj punktoj mi tamen ne konsentas kun S-roj Baumann kaj Böhringer. Ekzemple mi ne kredas, ke adjektivo nur povas esprimi, kiel io *aspektas*. Kiam la aŭtoroj skribis tion, ili certe por momento ne pripensis, ke ekzistas ankaŭ adjektivoj kiel: bona, sprita, grandanima ktp. — Nu! kelkfoje eĉ Patro Homero dormis. *Valc.*

Esperanto-Lehrgang nach preisgekrönter Methode mit systematischer Wortbildungslehre von G. Christoffel. Zweite, verbesserte und erweiterte Auflage (4. - 5. Tausend). XX + 124 S., 12 1/2 x 19 1/2 cm. — Verlag von A. Graff's Buchhandlung, Braunschweig. 1913. Pr: brosch. 1.50 M., geb. 2.— M. [154]

Lernolibrojn mi ordinare timeme malfermas, ĉar mi faris malbonajn spertojn. Sed pri la pri arolata libro mi estis surprizata. Oni ofte aŭdas: Por lerni Esperanton, oni ne bezonas instruiston. Mi konsentas, sed mi aldiras: Por tiu celo la lernolibro de Christoffel estas rekomendinda. Ĝi estas vere bona libro por aŭtodidaktoj. Mankas nek la historio de Esperanto, nek la „Anleitungen zur erfolgreichen Erlernung des Esperanto“.

La libro havas 2 ĉefpartojn: 1. Lautlehre und Sprachlehre, 2. Wortbildungslehre durch Vor- u. Nachsilben. Per tia aranĝo tiu ĉi libro tute diferencas de siaj kunuloj. Ĝi ne tedas la lernanton per tro multe da novaĵoj, sed enkondukas lin iom post iom en la malfacilaĵojn. Ĉu la divido en 69 paragrafojn ankaŭ estas bona? Pri tio mi dubas. Kur oĵ ne devas daŭri tro longtempe; per la divido de la lernolibroj en 12 - 15 lecionojn la kursgvidantoj ĉiam havas bonan resumon.

En la lernolibro de Christoffel oni ankaŭ ne trovas multajn preserarojn, kiel en multe da aliaj sam-specaj verkoj, sed pri kelkaj mi devas skribi. Paĝo 7, 4a linio de malsupre: *Kiel (oder kia) estas la vetero*. Mi preferus nur sole citi la formon *kia*, ĉar oni demandas pri eco. Vidu pri tio la piednoton sur paĝo 8: „Das Eigenschaftswort gibt die Beschaffenheit eines Dinges an“. Se oni nun demandas pri eco, oni devas ankaŭ uzi la tiurilatan demandan pronomon; „kiel“ postulas adverbon. — Paĝo 13: *Jen la najbarino kun sia frato kaj lia knabeto, kiu sidas sur sia (ŝia) brako*. „Kiu“ estas objekto, do *sia* tute malĝusta, ĉar laŭ tio la knabeto sidas sur sia propra brako. Kial estas metita inter krampoj (ŝia), kiu estas sole ĝusta? — Paĝo 54, 1a linio, staras *Cu* anstataŭ *Ĉu*.

Stirio, ilustrita gvidlibro. (Represo el „Universo“, Heckners Verlag, Wolfenbüttel.) Germana originalo de *Karl W. Gawalowski*; traduko de *Karl Bartel*. 12 pĝ., 15 1/2 x 22 cm. — Eldonita de „Landesverband für Fremdenverkehr in Steiermark“, Hauptplatz 12, Graz (Aŭstrio). 1913. Pr: 1 respondkuponon. [169]

La „Landesverband für Fremdenverkehr in Steiermark“ (Provinca Ligo por fremdulaj aferoj en Stirio) en Graz jam okaze de la tria tutaŭstria Esperantokongreso en Graz ebligis la eldonon de 80-paĝa ilustrita gvidlibro tra Graz en Esperanto kaj multe favoras la Esperantomovadon. Nun ĝi denove eldonis ĉi tiun belan libreton, kiu rakontas pri la belegajoj de la bela Alpolando Stirio, nomata ankaŭ la „verda Stirio“. La libreto, kiun ornamas 23 belaj ilustraĵoj, estas aparta represaĵo el la gazeto *Universo* (Heckners Verlag, Wolfenbüttel). La sekretario de la nomita unuiĝo, la urba oficisto S-ro Josef Rückl, estas mem

esperantisto kaj membro de la Stiria Esperantista Societo en Graz. Ni esperantistoj devas danki al la ligo, kiu tiamaniere ekkonis la valoron de Esperanto por la turismo kaj per tio helpas al la Esperantomovado, kaj tial ĉiu esperantisto mendu la libreton, por montri al la unuiĝo la disvastigon de Esperanto. *G. G.*

≡≡≡ **Por lertuloj** ≡≡≡

Enigmoj kaj problemoj

No. 7

Muzika enigmo

- | | |
|------------------------------|--------------------|
| 9 8 10 5 (o) | muzika instrumento |
| 10 11 2 7 12 (o) | harmonia sonado |
| 7 2 13 10 5 14 (o) | muzika verko |
| 8 5 15 17 7 18 13 4 5 17 (o) | muzika ilo |
| 16 18 6 (o) | muzika verko |
| 10 7 8 (o) | muzikaĵo |
| 1 2 3 4 5 6 7 8 5 | opero |

La komencliteroj de la trovitaj vortoj nomos grandan muzikdramon.

Majo

No. 8

Kun e parto de l' homa korpo, kun g malmola substanco, kun f veturilo.

Max Butin

No. 9

Kvadrata enigmo

1	2	3	4	5	6	7
		c		r		
	n		s		o	
r						a
i						n
	r		m		z	
		o		o		

La liberaj kvadratoj estas plenigitaj per literoj tiamaniere, ke la vertikalaj linioj nomu

1. arbon, 2. birdon, 3. floron, 4. nordlandanon,
5. parton de la okulo, 6. altprezan ŝtonon, 7. frukton.

La unua horizontala linio nomos rampaĵon.

Elsbeth Mertens

En la venonta numero de eldono B ni publikigos la solvojn de la ĉi-supraj problemoj. La divenintoj bonvolu sendi la solvojn, **skribitajn nur sur poŝtkarto sen iu alia komuniko**, ĝis la 5a de l' venonta monato al nia redaktoro, **Friedrich Ellersiek**, Wissmannstr. 46, Berlin S. 59. — Tri el la solvintoj ricevos libropremion, kiun ili povos elekti el la katalogo de nia eldonejo. (*Valoro de ĉiu premio ĝis 1 Sm.*)

La gajnontoj bonvolu sciigi al nia eldonejo, Ader & Borel G. m. b. H., Dresden-A. 1, Struvestr. 40, la librojn, de ili deziratajn.

Solvoj el la antaŭa kajero

No. 4

Ĉirkaŭe la tero sub neĝo jen dormas,
Riverojn kaj lagojn glacio surkovras,
Malvarmo krevigas la arbojn.
Sed ĝoje kaj gaje la homoj sin movas,
Diversajn manierojn de sporto uzadas,
Por hardi firmege la korpojn.

No. 5

roko — koko — rokoko

No. 6

p e d i k (o)
e l e k t (o)
k u k o l (o)
b r a n d (o)
k o k o s (o)
a n o n c (o)
m o n a t (o)
l a g e t (o)
p a r i z (o)
p r e m i (o)
a n s e r (o)
s p o n g (o)

Deka Kongreso — Parizo

Ĝustajn solvojn sendis*)

1) *de ĉiuj numeroj*: J. Bal, fervoja komizo, B. (Holando); Johannes Bauer, G.; F-ino Katharina Bock, N.; Stefan Bogdanov, N. (Rusujo); Kurt Böhme, D.; R. Bollermann, poŝtinspektoro, N.; Leonhard Borkowski, G.; G. Brucks, cand. math., B.; Max Butin, T.; V. Didrihson, O. (Rusujo); M. Dlonra, D.; F-ino Henny Drückhammer, L.; Joh. Engels, K.-K.; Walter Falke, paroĥa helpanto, L.; Max Fischer, saksa fervojasistanto, W.; S-ino Große, juĝejkonsilista edzino, W.; August Großmann, B.; Otto Hempel, pastro, L.; A. Henneberger, H.; H. J. Hoen, M.; Alfred Hönicke, E.; A. Ivanickij, St. P. (Rusujo); F-ino Math. Jaquel, M.;

*) Ĉar la adresoj ĉi tie publikigitaj estis fuŝuzataj de certaj kontraŭuloj, ni de nun publikigos la nomojn de la solvintoj, aldonante nur la komencliteron de ilia loĝloko. Kiu deziras scii la adreson de iu solvinto, bonvolu sin turni al ni. *La redakcio*

Stefan Korcz, P.; F-ino Alwine Körner, B.; F-ino Margarete Lachmund, L.; Karl J. Loy, jurpraktikanto, B.; J. May, St. W.; Otto Miehlisch, St.; E. Momber, H.; Dro Müller, N.; Hermann Müller, poŝtoficisto, D.; Ernst Muthschall, P.; S-ino Käte Petzold, L.; W. Reichert, supera fervoja sekretario, P.; E. Rödiger, supera poŝtpraktikanto, O.; M. Rosenlöcher, W.; Wilh. Schimmel, kantoro em., D.; Josef Schmalzl, gimnazia asistanto, N.; Prof. Dro. Schmidt, W.; Paul Schmidt, D.; Reinhard Schmidt, referendario, E.; E. Schrape, imp. sup. limdepagrevizoro, M.; W. Schuhmacher, ĉefinstruisto, W.; Herm. Schulz, S.; Joseph Sommer, L.; Johann Tuschl, U. (Bohemujo); E. Ulitsch, instruisto, G.; F-ino Paula Walter, instruitino, K.; W. Wittbrodt, instruisto, N.; Wilh. Wolf, G.; F-ino E. Zibell, Sch.-B.; E. Ziemann, distriktjuĝeja sekretario, G.

2) *de du numeroj*: Wladislaus Chojetki, instruisto, M.; K. Czaster, eksstaciestro, G.; Dro A. Hloucha, W. (Aŭstrio); F-ino Marie Jürgens, instruitino, B.; Th. Kempe, R.; Max Larass, bienisto, G.; v. Unruh, K.; Franz Weiss, ekspedanto, D.

La premiojn gajnis per loto: F-ino Henny Drückhammer el L., S-ro Walter Falke el L. kaj S-ino Große el W.

Korekto — En la antaŭa numero ni erare ne citis inter la solvintoj de *du enigmoj* S-ron F. Schmidhofer, fakinstruisto, B. (Moravujo). Ni petas S-ron Schmidhofer, pardoni al ni la eraron. Samtempe ni atentigas lin pri tio, ke ĝi povis okazi tial, ĉar li, malgraŭ nia insista peto, ne uzis poŝtkarton por siaj solvoj, sed leterfolion, kiu neatentite miksiĝis kun aliaj aferpapiroj. Do: ĉiam uzu nur poŝtkarton por sciigi la solvojn!

Redakciaj respondoj

L. P. — *Sm.* estas la mallongigo de *spesmilo*, valoro de la internacia monalkulsistemo de la esperantistoj. La unuo de tiu ĉi sistemo estas la *speso*; dek spesoj estas unu *spesdeko*, cent spesoj = unu *spescento*, kaj mil spesoj = unu *spesmilo*, kiu egalvaloras proksimume 2 M. Sekve, se vi legas, ke iu libro kostas 1.250 Sm., la prezo laŭ germana mono estas 2.50 M. La elpensinto de la sistemo estas la svisa scienculo Prof. René de Saussure.

La kotizo por la Dekka Kongreso nur ŝajnas al vi alta; efektive ĝi tia ne estas kompare al aliaj, neesperantistaj kongresoj kaj rilate al tio, kion la kongresanoj por sia kotizo ricevos kaj ĝuos en Paris. Bonvolu ankaŭ konsideri, ke la aranĝo de tia kongreso postulas multe da mono, kiun la organiza komitato povas havigi al si ĉefe nur per la kotizoj de la kongresanoj.

Al kelkaj demandoj — La dua artikolo pri „Radia telefonado kaj Esperanto“ sekvos en No 4 B.

Samideanoj! Por vizito al la Dekka aliĝu al nia karavano!